

Turka Stelo



Ĉu la kvara ondo jam venis?



SALUTON,

Jen la junia numero de nia revuo Turka Stelo. En ĝi vi trovos interesajn artikolojn. Ekzemple:

- la teksto pri kino-arto de Konuralp Sunal el Turkio en la angulo "Tempo Sigelita"
- la teksto pri la greka mitologio de Spiros Sarafian el Grekio, "Damonio kaj Fintiaso"
- la humuraĵo, kiun tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio, "La mortiginto de Tito"
- la tradukaĵo de Bardhyl Selimi el Albanio de la artikolo de Adem Demaçi, "Miaj prizonoj - mia granda ŝanco"
- la humuraĵo de Laimundas Abromas el Litovio, "Psikologia Krizo"
- la rakonto de Julian Modest el Bulgario, "Larmoj de ĝojo"
- la poemo de Venelin Mitev el Bulgario, "Fabelo pri bulgara knabino"
- la seria tradukaĵo de Antanas Vaitkevičius el Litovio de la libro "La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj"
- la teksto de nia kara kontribuanto el Malto Carmel Mallia, "Domo ... Hospitalo kaj Reen" (ni deziras

rapidan resaniĝon al kara Carmel Mallia)

- la teksto de Roland Platteau el Francio "Angel Arquillos Lopez aŭ la metafiziko de l'dubo" kaj multaj aliaj tekstoj el diversaj landoj tra la tuta mondo...

Aliflanke en la ekstero la viruso furoras kaj oni parolas pri la kvara ondo. Jes, somero venis kaj en ĉiu lando pro ekonomiaj kialoj oni malfermas la ekonomion kaj malligas la mezurojn kaj eble konscie malaltigas la nombrojn de kazoj anoncitajn. Eble nin atendas eĉ pli malbona tempo en aŭtuno ĉijare...

Restu sane kaj kuraĝe...

Bonan legadon al ĉiuj !

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Printempa lumo	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Fantomo	4
Ciklo kun Hori Jasuo	4
Tempo Sigelita	5
DAMONO kaj FINTIASO (SIRAKUZO)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	9
La Kimero - Rakonto el la estonteco (13)	10
El la literaturaj paĝoj de MAS	11
Lupo kaj Paŝtistoj / Idolo	12
Angel Arquillos Lopez aŭ la metafiziko de l'dubo	13
La mortiginto de TITO	14
Domo ... hospitalo kaj reen	16
Peter Zilvar (2014)	17
Mirinda renkonto (8/10)	19
Hajkoj	20
La baza leĝo estas amo	20
Ŝercoj	21
Krucvortenigmo	21
La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj(2)	22
Lasta Deziro	24
Poemoj de KOUNO Susumu	25
Psikologia Krizo	26
Miaj prizonoj- mia granda ŝanco!	27
Niaj E-kursoj kaj konferencoj en julio kaj aŭgusto	29
Larmoj de ĝojo	30
Solvo de la krucvortenigmo	30
Fabelo pri bulgara knabino	31
Malnova ĝardeno (Régi kert)	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo. Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:
22/11 Akuzativo - 29/11 Transitiveco - 06/12 Participoj - 13/12 Korelativoj - 20/12 Prepozicioj - 27/12 Sufiksoj - 03/01 Refleksiva pronomo: Si
<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

Printempa lumo

Ho lumo, mia lumo, mondon pleniganta,
okulojn kisanta, koron karesanta lumo.

La lumo dancas por mi, karulo, centre de l'vivo,
la lumo tuŝas por mi la harpon de amo.

Malfermiĝas la ĉielo, sovaĝe blovas vento,
rido pasas super la tero.

Birdoj etendas la flugilojn en lum-maro,
jasminoj kaj lilioj burĝonas en la lum-inundo.

La lumo spruĉas oron sur ĉiun nubon, karulo,
kaj malavare dispersas juvelojn.

Gajeco saltadas de folio al folio, karulo,
kaj senmezura ĝojo.

La rivero de Ĉielo forlasas sian ejon,
inundante ĉion per ĝojo.

(Rabindranath Tagore: Kant.-oferoj, 57.)

- La belan poemon de Rabindranath Tagore, el la
angla lingvo hungarigis kaj Esperantigis la
vicprezidanto de HEA: D-ro, profesoro Endre
Dudich. -

Fonto: **NORDHUNGARIA INFORMO** (Marto 2006)

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Dum la redaktado de la junia numero de Turka Stelo daŭras la maja Esperanto-Sumoo 2021! (de la 9-a ĝis la 23-a de majo)

Esperanto-Sumoo estis elpensita por ke esperantistoj legu esperantajn librojn. Dum la tempo, kiam dikaj sumooistoj luktas en Japanio, ni esperantistoj legas esperantajn librojn. Antaŭ la aranĝo ni elektas libron, kiun ni legos kaj decidas kiom da paĝoj ni legos ĉiutage. Se ni plenumas nian tagan taskon, ni havas unu venkon. Tiamaniere ni luktadas 15 tagojn. Sumooistoj en Japanio luktas kontraŭ aliaj luktistoj, sed ni esperantistoj luktas nur kontraŭ malfortoj de sia propra personeco.

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 954 (2021-05-21)
TEJO serĉas novan redaktoron por la revuo Kontakto
Esti redaktoro

signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de la organizo, sed ankaŭ samtempe persone kaj movade pliriĉiĝi. [...]

N-ro 953 (2021-05-19)

Mesaĝo de UEA okaze de la Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo, 21 majo 2021
[...]

N-ro 952 (2021-05-15)

**“Tiu ĉumalofa sufikso -UM”:
nova libro senpage elŝutebla ĉe UEA**
[...]

N-ro 951 (2021-05-14)

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Familioj, 15 majo 2021: Familioj kaj novaj teknologioj
[...]

N-ro 950 (2021-05-06)

Unesko ĝojas pro 5 686 respondoj al enketo en Esperanto: la enketo daŭros ankoraŭ du monatojn
[...]

N-ro 949 (2021-05-04)

2-a Virtuala Kongreso de Esperanto: jam eblas aliĝi, senpage por individuaj membroj de UEA ĝis la 4-a de julio
[...]

TEJO



Ni serĉas novan redaktoron de la revuo Kontakto
Esti redaktoro

signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de la organizo, sed ankaŭ samtempe persone kaj movade pliriĉiĝi. [...]

Internacia Tago kontraŭ Homofobio, Bifobio kaj Transfobio 2021

La Internacia Tago kontraŭ Homofobio, Bifobio, Interseksfobio kaj Transfobio (angle, International Day Against Homophobia, Biphobia, Intersexphobia and Transphobia) estas tago por substreki la rajtojn de la GLAT-komunumo kaj [...]

Partoprenu trejnadon en Roterdamo pri volontulado en Esperantujo

Komence de junio, kadre de projekto pri Volontulado kaj Asocia daŭripov-evoluo okazos trejnado pri interŝanĝo de bona praktikoj rilate al volontulado ĉe esperantaj organizoj. [...]

Malferma alvoko por trejnistoj, “Diversa, sed Egala”

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo (KdE) kaj la Slovaka Esperanto-Junularo (SKEJ) organizas la trejnan kurson (TK) ‘Diversa, sed Egala: Edukado de Junuloj pri Interseksa Aliro’. [...]

Malferma alvoko – TEJO-estranaroj 2021/22

La Elekta Komisiono de TEJO serĉas kandidatojn por la Estraro de TEJO, por oficperiodo ekde la 1-a de septembro 2021 ĝis la 31-a de aŭgusto 2022. La Estraro estas la ĉefa plenuma instanco de TEJO. [...]

Leteroj de niaj legantoj



Dankon kaj pliajn sukcesojn al vi, kara!
Gafur Mirbazev el Uzbekio



Karaj! Ni multe dankas ankaŭ pro la nova numero de la TURKA STELO. Ni baldaŭ komencos ĝian legadon.
Bonan sanon

Adri Pásztorlaszlo el Hungario



Karaj dankon. Por mi estas granda ĝojo kontribui al via revuo, ĉar samtempe mi povas fieri, ke mia modesta penado helpas al poresperanta afero. Dezirante sukcesojn en via agado

Antanas Vaitkevičius el Litovio



Mi kun granda ĝojo ricevis lastan, majan numeron de impona, interesa revueto Turka Stelo. Ĝi estas belaspekta kaj nepre leginda. Mi samtempe sendas al vi mian lastan, ĵus verkitan humuraĵon. Mi esperas, ke ĝi kaptos vian atenton kaj ĝi estos publika sur paĝoj de TS. Kun bondeziroj kaj amikaj salutoj

Laimundas Abromas el Litovio



Tutkorajn bondezirojn kaj dankon pro la revuo, kiu estas ĉiam interesa. Mi sendas al vi aldone rakonton por Turka Stelo.
Amike,

Luiza Carol el Israelo

FANTOMO *

verkis kaj sendis Gairik Patranobis el Barato

Fantomo ! Fantomo !
Kie estas via domo ?
Kial vi loĝas sur arbo
kun longa blanka barbo ?
Kial vi timigas geetulojn
Per viaj ruĝaj okuloj
Kial vi ridegas dum noktoj
Ekspozante terurajn dentojn ?
Kial ne dormi pace
kiel homoj lace.
Post diversaj agoj
En ĉiuj kurantaj tagoj
Vi estas forta kaj lerta
Homoj ne sentas komfortaj

Sed kial vi timas de lumo
kiam aperas la suno ?
Venu al mia hejmo
Loĝu kun mi feliĉe
Fantomo, Fantomo ne timu
Manĝu dormu sufiĉe...

verkis kaj sendis
Gairik Patranobis el Barato

* "Fantomo" estas figuro videbla,
sed ne palpebla, kia oni imagis
reaperantan mortinton. Ĝi estas

"ghost" en la angla kaj
"vut" en la bengala.

Oni ne scias kio okazas post nia morto.
Tradicie oni kredas, ke ni fariĝas fantomoj. En bengala literaturo troviĝas diversaj fantomoj. Preskaŭ dudek kaj ili havas diversajn nomojn. Ili loĝas ĉefe en arboj kaj timigas homojn kaj geknabojn. Modernaj homoj ne kredas je ili sed amas rakontojn, filmojn, teatraĵojn kaj poemojn pri fantomoj.



Ciklo kun Hori Jasuo -- hajkoj kaj poemetoj de Elena Popova e Bulgario

Floras drogherboj.
Kaj la belega Malvo-
ĝoj' por abeloj.

Budhoj por memor' –
antikva tradicio.
Ja, Estu pacon!

Virinoj – ili
solaj estas floroj en
ĉiu famili' .
Ili ekfloras pro am'
kaj forvelkas sen amo.



VOJAĜOJ DE SULLIVAN (SULLIVAN'S TRAVELS)

“Ĉi tiu filmo ame rememoras tiujn, kiuj ridigis nin; ĝi estas dediĉita al la buntaj ĉarlatanoj, klaŭnoj kaj pajacoj de ĉiuj aĝoj kaj nacioj, kiuj iomete faciligis nian ŝarĝon per siaj penoj.”

Vojaĝoj de Sullivan ĝenerala antaŭparolo - 1941

Ne estus malĝuste, se mi dirus, ke ĉi tiu estas filmo vigla kaj plena je surprizoj de la komenco ĝis la fino. Meze de la filmo kvankam mi scivolemis “Ĉu la skripto estas blokita? Kial li revenis reen? Kio pri la vojaĝoj?”, tamen ĉio ekfunkciis bone ene de la fluo de la filmo.



En la malfermo, leginte la dediĉon al la komikuloj kaj klaŭnoj, ni subite atestas la murdan batalon de du viroj sur moviĝanta trajno en la mallumo. Poste ili falas en la maron - aŭ en lagon - kaj ni vidas la surskribon “Fino”. Kompreneble, mi intuicie konstatis, ke temas pri filmo en filmo. Fakte, John Sullivan, sukcesa kinoreĝisoro konata pro siaj komercaj komediaj filmoj, komencas pledi pri la filmo, kiun li montris al siaj du produktantoj. Li ne plu volas filmi komediajn filmojn. La mondo evoluas en alian direkton. Oni devas fari filmojn, kiuj priskribas la vivojn de prematoj, laboristoj kaj pelitoj. Dum li diras ĉi tiujn, la diro el unu de la produktantoj: “... sed kun iom da sekseco ...”, montras kaj la kontraston inter ili kaj la komedion de la situacio.

Laŭ iu blogo; La nomo Sullivan estas paronimo de “Sully” en la angla. “Sullen” signifas malbonhumora, malgaja, enuiga. Jes, la fama direktoro, kiun ni konas pro siaj biletvendantaj komedioj, tre malmulte ridas tra la filmo. Kiel la fama aktoro Walter Matthau, li ŝajnas malgaja. Nun mi ne povos resumi ĉi tie la dialogojn de la du produktantoj kun Sullivan en la unua sceno; sed ĝi estas plena je rimarkoj pri la merkato, la pensmaniero de Holivudo, komunismo (nia reĝisoro ne estas komunisto), kapitalismo, kaj estas kvazaŭ uverturo de la intensa komikaj dialogoj en la filmo. Ĉi

tiu ne estas rakonto pri forlaso same al tiu, de Gautama Siddharta (Budho), kiu forlasis sian princecon, palacon, kaj povon aŭ same al tiu de Hector Mann, la fama muta filmo aktoro, en la libro “La Libro de iluzioj” de Paul Auster. Nia heroo, Sullivan, volas alivestiĝi por kaŝe enmiksiĝi inter la malriĉuloj kaj subprematoj dum certa periodo por ebligi lin rakonti la vivon de ili. Do li volas vojaĝi for de sia hejmo, riĉeco kaj kariero.

La nomo “Vojaĝoj de Sullivan” estas referenco al la libro de Jonathan Swift en 1726 konata kiel “Vojaĝoj de Gulivero”. Li volas esti inter la malriĉuloj, sed kiel ni komprenas el la kontraŭdiroj de la produktantoj klare vidiĝas, ke li estas “bona familia knabo”, kiu neniam havis suferojn en sia vivo. Ni komprenas, ke unu el la produktantoj mensogas, parolante pri liaj problemoj dum lia juneco kaj pri la kontrasto inter ili, post kiam tiu direktoro foriras, pro la konversacio inter la aliaj du.

Sullivan komencas siajn vojaĝojn kune kun la teamo de kuiristo, kuracisto, ĵurnalisto, ktp, kiujn sendis la produktantoj por zorgi pri li, kvankam li tion ne volas. Li provas perdigi sin al ili dum li petveturas en la aŭto de junulo, kiun la junulo stiras rapidege. Ho, dume, lia dialogo kun siaj du servistoj rigardante en la spegulo al sia ĉifonita kostumo antaŭ ol li ekiras, rememorigis min pri la klaŭnaj-reĝaj dialogoj en ŝekspiraj tragedioj. Precipe estas unu servisto, kiu pedante avertas lin pri la diferenco de la malalta klaso kaj la klaso al kiu Sullivan apartenas. Nia heroo estas en tre improvizia pozicio al ambaŭ la produktantoj kaj la servantoj. Laŭ ili, la malriĉuloj ne volas suferi se ili havus la eblecon, malriĉuloj volas amuziĝi. Sed nia heroo estas



insistema.

Preston Sturges, la skriptisto kaj ankaŭ la reĝisoro de la filmo, surprizas nin komence, kiam li sendas Sullivan reen al Holivudo iun matenon kiel la rezulto de

>>28

Estas diversaj nesensaj kaŭzoj, kiuj estigas agrablan staton en la konscio de la homo, rilate al ties kunesto kun aliuloj. Estas plejparte reciproka inklino de iu por alia, bazata sur proksimiĝo de scioj, interesoj, gustoj, celoj, k.s., do, estas tio kion ni nomas simpatio, reciproka altiro, estas tio kio estigas kamaradojn, kompanojn, kunulojn!



Tamen, estas ankaŭ io, multe pli profunda ol ĉio tio ĉi, estas la amikeco, ligiĝo tute alia, nobla, altvalora, neŝancebla kaj vere rara. Amikeco estas libera kaj firma ligiĝo inter homoj, baziĝanta sur reciproka rekono de ilia merito, estas firma, interna amo, precipe ligita kun senlima, reciproka estimo kaj sinofero. Estas, ja, pro tio, ke la antikvaj helenaj saĝuloj diris, ke vera amikeco, bazita sur moralaj celoj, povas esti nur inter homoj virtaj!

La nuntempaj homoj nomas amikeco siajn pli intimajn rilatojn kun eksterfamiliaj aliuloj, rilatojn, kiujn plejofte naskas komunaj aŭ similaj bezonoj kaj interesoj de la ĉiutaga vivo. Estas pro tio, ke mi emfazas la klaran diferencon, ĉar mi intencas ĉi-sube rakonti la historion de Damono kaj Fintiaso, la du historiaj personoj, kiuj restis en la homa historio kiel simboloj de la amikeco! Tiuj du viroj estis Sirakuzanoj, do, naskitaj en unu el la plej grandaj, riĉaj kaj potencaj helenaj ŝtatoj de la antikveco.

Jen pri kio temas: La sudorienta marbordo de Sicilio (Σικελία) formas larĝan duoninsulon, sur kiu estas tre antikva, belega havenurbo nomata Sirakuzo. Tiu urbo estis kolonio de la Korintanoj (Κορίνθιοι), fondita en 757 a.K. La ekstremon de la duoninsulo formis insulo tre apuda al la kontinento, kiu estis konata al la Helenoj kun la nomo Ortigio (Ορτυγία). Tiun, do, insulon atingis unue la koloniantoj kaj sur ĝi ili instalas sian unuan civiton. Pli poste ili faris taluson kaj kunigis la insulon al la kontinento, tiele ili etendis sian teritorion kaj fondis sian ŝtaton, sur tero tre fekunda kaj

en loko tre signifa por la komunikiĝo kaj la komerco inter la oriento kaj la okcidento de Mediteraneo (Μεσόγειος).

Sirakuzo posedas du grandajn havenojn, la unu el kiuj estis la plej bona kaj plej sekura de la tuta Sicilio. Tiele, kaj precipe dank' al sia favora situo, al la trikit-kaj vinkomerco kaj al la forta armeo, Sirakuzo iom-post-iome iĝis la plej granda, riĉa kaj potenca el ĉiuj antikvaj helenaj ŝtatoj de la suda Italio.

Ĝi estis ne nur riĉa urbo, sed ankaŭ civilizacie evoluinta, ĉar, pro sia famo estis vizitata de multaj scienculoj, artistoj, intelektuloj, pensistoj, filozofoj el la tuta helena lando, kiuj fondis tie skolojn, instalas instituciojn, kreis kaj instruis, aldonis brilon kaj gloron al la forta kolonio. Impresaj atestoj de tiu brila epoko estas ĝis nun savitaj kaj ekspoziciataj en riĉaj muzeoj, tamen plej vidinda estas la ĝis niaj nunaj tagoj staranta teatro, unu el la plej grandaj kaj belaj teatroj de la tuta antikva helena mondo.

Estas strange, ke malgraŭ tio, ke en preskaŭ la tuta helena lando, kontraste al la barbara mondo, la sola akceptita kaj aplikita reĝimo estis la demokratio, en Sirakuzo longe regis tiranio, la reĝimo nuntempe konata kiel diktatoreco.

Tion estigis la subita riĉiĝo kaj plimultiĝo de la loĝantaro kaj la dividiĝo de la popolo en ekonomiaj kaj politikaj klasoj, kiuj kondukis al internaj konfliktoj kaj kolizioj. Tiel, en la jaro 484 a.K., post venkoporta milito kontraŭ la Kartaganoj (Καρθηδόνιοι), la armeestro Gelono (Γέλων) kaptis la okazon, li uzurpis la regpovon kaj iĝis absoluta reganto, tirano!

Tiam, Sirakuzo estis milite tre forta, ĝi posedis konstantan armeon el 20.000 viroj, 200 milit-pretajn triremojn kaj tute plenajn kasojn.

La forto de Gelono igis lin tiom aroganta, ke, kiam la Helenoj de la centra patrolando petis pri la helpo de Sirakuzo dum la tuthelena milito kontraŭ la invadintaj Persoj, li volonte jesis, postulinte tamen la estrecon de la tuthelena armeo. Kompreneble, tio ne estis akceptita de la Helenoj kaj tiele Sirakuzo ne partoprenis la plej glorajn militojn de la helena etno.

Gelonon postsekvis aliaj tiranoj, tamen, estis iu popola ribelo kiu forigis la tiranion kaj restarigis demokration, tamen tio daŭris nur kelkajn jardekojn, ĉar en la jaro 405 a.K. nova tirano de Sirakuzo iĝis Dionizio (Διονύσιος) kaj post ties morto lia samnoma filo, Dionizio la pli juna. Malgraŭ tiuj politikaj ŝanĝiĝoj Sirakuzo restis ĉiam forta, tiom, ke ĝi akiris siajn proprajn koloniojn, ĝi etendiĝis, ĝi iĝis la unua, la centra forto de la itala Helenlando.





Ĉar diktatoroj kaj ĉiaspecaj tiranoj neniam mankis en nia mondo, ni ĉiuj bone scias, ke ĉiu tirano, antikva aŭ nuntempa, precipe suferas pro troa memadmiro! Ĉiuj diktatoroj, ordinare ĉirkaŭitaj de korteganoj malavaraĵoj je flataĵoj, iom-post-iome al kutimiĝas al la kredo, ke ili estas belaj, justaj, inteligentaj, kleraj, prudentaj, saĝaj, ĉiaj. Ili, do, opinias, ke ili rajtas ne nur la rekonon kaj admiron de siaj humilecaj proksimuloj, sed ankaŭ de la distingitoj de la spirita mondo, de famaj artistoj, verkistoj, pensuloj, filozofoj k.s..

Tia persono estis tiu tirano, Dionizio la pli juna, kiu havis pli fortan inklinon al la filozofio, eble ĉar iu lia onklo nomata Diono (Δίων) estis sufiĉe fama en sia patrujo filozofo, eĉ disĉiplo kaj amiko de la granda helena filozofo Platono (Πλάτων).

Tiel, Dionizio instigite de sia onklo, decidis organizi la reĝimon de Sirakuzo laŭ la principoj priskribataj de Platono en la verko "Ŝtato" (Πολιτεία). Do, helpe de Diono, li invitis Platonon en Sirakuzo kaj komisiis al li la realigadon de siaj revoj. Ŝajnas ke Platono favoris la planojn de Dionizio, tamen, koruptitaj amikoj de tirano, intrigis kontraŭ Diono, sekvis agitado, maltrankvilo, ia tumulto, nu, Platono foriris de Sirakuzo, la planoj de Dionizio ne efektiviĝis.

Kiel jam dirite, Sicilio kaj la suda kontinenta Italujo estis teritorio, kiu altiris multajn helenajn intelektulojn kaj filozofojn. Inter tiuj estis la mond-fama filozofo – matematikisto Pitagoro (Πυθαγόρας), kiu iris kaj enloĝiĝis en Krotono (Κρότων), civito de la suda Italujo, malnova kolonio de la Aĥajanoj (Αχαιοί). Tie, Pitagoro fondis sian ĉefan filozofian skolon, kiu altiris la intereson de multaj adeptoj, kaj iĝis centro de la fama, sed iom stranga, pitagora filozofio. Mi diras tion, ĉar Pitagorismo estis filozofio mistika, kiu entenis doktrinojn religiajn, moralajn, sciencajn, politikajn, multon!

La Pitagoranoj unue studis la sciencon de matematiko, sur kiu baziĝis la strukturo de ilia kredaro kaj paralele ili studis la arton de la muziko. Sed, estis

ne nur la kredoj, principoj, teorioj kaj doktrinoj, la Pitagoranoj praktikis misterkulton, ili partoprenis mistikajn ritojn, kiuj probable havis rilaton al filozofiaj teorioj pri la metempsikozo, kiun ili akceptis. Krome, la Pitagoranoj havis sian propran vivmanieron, ili sekvis vegetaran dieton, ili distingiĝis per sia aldoniteco al modereco, abstinemo, hardiĝemo, ili al kutimiĝis al absoluta disciplino je la pli maljunaj kamaradoj kaj al plena akceptado de la aŭtoritateco de la majstroj.

Tiaj, do, filozofoj, tiaj personoj estis la du junaj viroj, Damono kaj Fintiaso, kiuj, en la tagoj de Dionizio la pli juna, vivis kaj aktivis en Sirakuzo. La du filozofoj estis vaste konataj en la urbo kaj tre simpatiaj, precipe al la edukita junularo, kiu admiris ilin kaj ĝuis la publikajn iliajn prelegojn kaj diskutojn en kunvenoj de artistoj, verkistoj kaj ĉiaspecaj intelektuloj.


La tirano, kiu deziris montri, ke ankaŭ li rajtas lokon en la intelektularo de la lando, klopodadis en ĉia okazo alproksimiĝi al renomaj tiaj personoj, gajni ties simpation kaj amikecon. Tiel, li deziris ankaŭ altiri amikan intereson de la du junaj filozofoj, kiuj, tamen, viroj liberpensaj, ne nur antipatiis, sed tute malestimis la severan tiranon. Kaj ili ne nur malestimis la tiranon, sed ili ne hezitis subteni la malmultajn politikistojn, ĉiufoje kiam tiuj lastaj aŭdacis kritiki la politikon de la malaminda despoto.

Kaj estis ne nur tio; Fintiaso, kiu pli multe ol Damono interesiĝis pri la politikaj aferoj, enmiksiĝis en konspiro de kontraŭaj al Dionizio politikaj personoj, estis entreprenita organizado de ia ribelo, kiu, tamen, tute fiaskis. La konspirintoj estis arestitaj kaj post la kutima en tiaj okazoj komika, hasta proceduro, ili estis kondamnitaj al mort-puno.

La tago de la publika ekzekuto estis difinita kaj anoncita, kiam, surprizite, Dionizio aŭdis, ke iu el la kondamnitaj persiste petas paroli al li mem.

Lia surprizo iĝis ankoraŭ pli granda, kiam li eksciis, ke tiu kondamnito estas Fintiaso, la konata filozofo. La tirano, pensante ke la fiera filozofo estis preta humiliĝi petegante pri lia kompatato, permesis la aŭdiencon. Tamen, la filozofo, kun la konata fiera mieno, tute ne petegis pri sia vivo, simple li konigis al la tirano, ke pro urĝa familia afero rilata al sia maljuna kaj mortopreta patrino, li devus iri, por nur du tagoj, al sia vilaĝo, por ion prizorgi kaj aranĝi.

Do, li petis, ke oni permesu al li fari tiun, tute necesan, vojaĝon. Kompreneble, li certigis la tiranon, ke la ĝustan tagon kaj horon de sia ekzekuto li nepre estos reveninta kaj pro tio li ĵuras per sia honoro. Tia ĵuro, la parolo de honoro de Pitagorano estis io sankta, estis promeso tute ne malobservebla, sed la tirano ne sciis tion, tamen li estis sufiĉe kontenta eĉ pro tio, ke la fiera filozofo ion petas de li. Tial, li ne tuj rifuzis la



peton; sciante ke la filozofo ne estas riĉa kaj dezirante humiliĝi lin, li postulis de li kontentigan garantion.

Fintiaso senhezite respondis, ke li povas doni garantion, ke li povas peti de unu sia amiko, resti, dum lia foresto, en la prizono, sur lia loko kaj esti ekzekutita en okazo de ne ĝustatempe lia reveno. La tirano ridis, li diris, ke ne povas esti persono, kiu akceptus resti en prizono kaj eble esti ekzekutita por kontentigi amikon. Tiam, Fintiaso petis, ke oni venigu lian amikon Damonon. La tirano, en granda konfuzo, kun avida scivoleco akceptis la peton de la kondamnito kaj post malmultaj minutoj tute surprizite aŭdis la alvenintan Damonon, trankvile kaj indiferece diri, ke volonte li akceptas la proponon de lia amiko, ke li estas preta lin anstataŭi.

La tirano povis fari nenion plu, li estis devigita akcepti la anstataŭiĝon, do, Damono estis kondukita al la ĉelo de la malliberejo kaj Fintiaso, lasite libera, tuj foriris al sia vilaĝo.

Pasis du plenaj tagoj kaj Fintiaso ne revenis. Venis la horo de la ekzekuto kaj Damono estis kondukita antaŭ la tirano, kiu, mokante lin, demandis kie estas lia amiko, kial li ne revenis ĝustatempe. Damono, tute trankvile respondis, ke li estas tute certa, ke lia amiko sendube renkontis neantaŭvideblajn malfaciligajn, kiuj malhelpis lin. Same trankvile, li certigis la tiranon, ke li estas tute preta sekvi la ekzekutiston. Tio okazis kaj post nelonge la tirano sidis sur sia trono, ĉirkaŭita de korteganoj kaj sekvantoj, dum la popolanoj, kun ne retenebla scivoleco kaj maltrankvilo, amasiĝis sur la placo, kie estis kondukita Damono.

Ĉio estis preta, la ekzekutisto atendis la signalon de la tirano, kiam sur la placo iĝis tumulto, senorda moviĝo de la spektantoj, estis aŭditaj laŭtaj voĉoj, kaj, jen, sur la plataĵo de la ekzekuto, haste, forte anhelante prezentiĝis Fintiaso. Li iris rekte apud Damonon, li puŝis lin malproksimen de la ekzekutisto kaj li staris sur lia loko. Dionizio bezonis kelkajn minutojn por konscii, kio ekzakte okazas kaj lia surprizo iĝis ankoraŭ pli granda, kiam li vidis, ke Damono ne retiriĝis, kontraŭe li puŝetis Fintiason, li ne akceptis lasi la lokon de la ekzekutoto, li

rezistis, ne volis foriri de la plataĵo.

Dum kelkaj minutoj la du amikoj interpuŝetis unu la alian, ĝis kiam, kriante intervenis la tirano, kiu petis ilin ekspliki kion ili faras. Tiam, Fintiaso diris, ke ĉar, laŭ lia promeso kaj la interkonsento, li revenis ĝustatempe, Damono devas foriri de la plataĵo kaj li mem devas esti tuj ekzekutita. Damono tamen kontraŭdiradis, ke ne, la interkonsento ne estis plenumita, ĉar kiam Fintiaso alvenis, la antaŭdifinita horo estis

jam pasinta kaj la ekzekuto devus esti farita; do, Fintiaso devas foriri kaj lasi lin suferi la ekzekuton.

Kiam Dionizio komprenis pro kio la du amikoj disputadis, tute konfuziĝis, li restis kvazaŭ fulmobatita, li ne povis kredi tion, kion li vidis kaj aŭdis. La du filozofoj, tute ignorante la tiranon kaj la ceterajn ĉeestantojn, daŭrigis sian diskutadon. Kun sia konata, orator-stila maniero, laŭvice parolis, ili pasie prezentis la unu al la alia argumentojn, subtenis sian tezon, ĉiu el ili pasie rezonis pri sia praveco, la unu klopodis konvinki la alian lasi lin morti! Estis ia publika, instrua, filozofia interparolado inter du elokventaj kleruloj, kiun silente kaj atente, kun miro aŭdis la amasiĝintaj popolanoj. Dionizio restis senvoĉa, li ne kredis al siaj okuloj kaj oreloj, sed ĉio tio ĉi, skuegis nekonatan al li internan forton, kiu tute subite emociis lin, tiel, ke ĝuste tiam li ekkomprenis, ke li estas tute, definitive venkita de la du viroj. Li konsciis, ke la ekstrema puno per kiu minaciis la du filozofojn estas por ili nur objekto por dialektika esploro. Li, ankaŭ komprenis kian forton havas la nekonata al li sento de la amikeco, de la sinofero, de la sindediĉo.

La tirano ordonis, ke oni lasu liberaj ambaŭ virojn, kaj tiuj lastaj, montrante nenian emociion, sen ia ajn signo de ĝojo aŭ kontentiĝo foriris kune, daŭrigante sian diskutadon!

Damono kaj Fintiaso restis en la historio de la homaro senmortaj; ili iĝis simbolo de la plej alta, plej nobla, plej virta ligilo kuniganta la homojn. Tamen, dank' al tiu historio, ankaŭ Dionizio restis senmorta; la homoj, en ĉiuj epokoj emas forgesi, kun abomeno forpuŝi de la memoro la ĉiaspecajn tiranojn, tamen, tiu Dionizio ne estis forgesita, ĉar li havis rolon en la bela historio de la du amikoj.

Kaj, por kompletigi la historion, mi aldonu, ke post kelka tempo, la tirano, opiniante, ke per sia fina decido rajtas la simpation de la du filozofoj, sendis al ili leteron, per kiu li laŭdis iliajn fortajn amikajn sentojn kaj petis ke ili akceptu ankaŭ lin kiel sian amikon. La du filozofoj, senkompleze respondis, ke ili ne povas iĝi amikoj de tirano!

La jaron 345 a.K. eksplodis ribelo, post kiu la

Korintano Timoleono (Τιμολέων), elektita reganto de la lando, ekzilis dumvive Dionizion kaj starigis la demokratian reĝimon en Sirakuzo.

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio

el GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE



Jean Ribillard kaj Ivo Rotkvić
Du magiistoj de la vortoj

Ĉi-foje mi prezentas al vi du verkistojn, kiuj meritas esti nomitaj magiistoj de la vortoj, verkistoj kiuj famiĝis en Esperantujo pro siaj unike esprimriĉaj lingvo kaj stilo: Jean Ribillard (1904-1962) kaj Ivo Rotkvić (1901-1983). La unua verkis nur originale, la dua ĉefe traduke, ambaŭ proze.

Jean Ribillard naskiĝis en Tour, Francujo. Li servis dum jaroj en la franca armeo en Nord-Afriko, sed ekŝiĝis el la armeo post la dua mondmilito kaj revenis al Francujo kaj loĝis en Nice. Tie li lernis Esperanton rapide kaj sukcese kaj komencis verki en la lingvo. Lia unua verko, vojaĝrakonto, titolita Kvin bildoj, aperis felietone en "Heroldo de Esperanto". En 1956 aperis ĉe Universala Esperanto-Asocio la broŝuro Vagado sub palmoj, deko da vojaĝbildoj el Alĝerio, tiam regata de la francoj. Ĝi tuj vekis atenton pro la kolor-riĉa precizo de la stilo. Jen ekzemplo el priskribo de la Sahara dezerto:

"Matene netaj kaj bluaj estas la ombroj, sed grade laŭ la supreniro de la suno ili malaperas kaj la konturoj de la dunoj stompiĝas. La ondoliniaj pintmontoj kaose svarmas kun rebriloj flavaj, rozaj, ruĝaj. Poste la krestoj glimlumas kaj eligas kvazaŭ blondan fumon. Estas la vento, kiu, senĉesa laboranto, skrapetas la plejaltaĵojn kaj forbalaas la subtilan sablopolvon."

Ne facila lingvaĵo por komencantoj, sed des pli instiga al progresantoj celantaj plenregon de la lingvo.

Sep jarojn poste, en 1963, unu jaron post lia morto, aperis la dua verko de Ribillard, Vivo kaj opinioj de majstro M'Saud, eldonita de Stafeto, la eldonejo de Juan Régulo Pérez. Ĝi estas fakte romano, tamen

intime bazita sur la spertoj de la aŭtoro en la Nord-Afrika dezerto. Tie la aŭtoro parolas en la personeco de azeno. Tiu parolo estas havas satiran tonon, tamen mildan kaj bonhumoran. La stilo estas flua, neniam rapidanta kaj posedas la saman lirikan karakteron kiel la vojaĝpriskriboj de la antaŭa verko. Matura saĝo karakterizas la viv-observojn de la Majstro N'Saud. Jen unu el liaj satire sagacaj observoj pri la homoj:

"La plimulto de la homoj forĝemas sian vivon pro deziroj, kiujn ili povas tre malofte kontentigi. Kaj kiam ili okaze sukcesas, ili tuj aspiras alion, konstante avidas kaj baraktas por ĉiam pli posedi, ĉiam pli ĝui. Ili sin pravigas, asertante, ke tiu senĉesa emo al akiro kaj plezuro estas la motoro de la progreso."

Ribillard vivis kiel fraŭlo kun siaj gepatroj en Nice. Post ilia morto li forlasis Francujon kaj pasigis siajn lastajn jarojn en Tahitio, kie li mortis.

Ivo Rotkvić, kroato, lernis Esperanton en 1921, kaj baldaŭ fariĝis tre aktiva en la enlanda Esperantomovado. Inter la du mondmilitoj li gvidis multajn Esperanto-kursojn kaj estas dirite, ke li eble pli multe ol kiu ajn alia influis la lingvan nivelon de tiama jugoslavia esperantistaro. Li estis membro de la Akademio de Esperanto kaj dum multaj jaroj estrarano de Jugoslavia Esperanto-Ligo. Li estis fama oratoro, redaktoro de Esperanto-revuoj, kapabla organizanto de Esperanto-aranĝoj – entute movada aktivulo unuaklasa.

Tamen lia reputacio pli intime ligiĝas al lia literatura aktivado. Originale li ja verkis paroladojn, recenzojn, antaŭparolojn – aparte menciinda estas lia eseo "Mesaĝo de nia originala literaturo", kiu aperis fronte de la kolekto "33 rakontoj – la Esperanta novelarto", eldonita de Stafero en 1964. Sed estis ĉefe liaj tradukoj, precipe la libraj tradukoj Cezaro (1934) kaj Tragedio en la Universo (1961), kiuj elstarigas lin kiel la plej eltrovema utiliganto de la latentaj kreopovoj de Esperanto. Cezaro estas ampleksa romano originale verkita de kroata aŭtoro, M. Jelušić. La traduko de Rotkvić signis novan epokon en la lingva evoluo de Esperanto per eksterordinare esprimriĉa lingvaĵo, kie la latentaj povoj de la lingvo estis malkaŝitaj en la servo de belarta stilo. Per tiu traduko Rotkvić gvidis la vojon al postaj Esperanto-verkistoj al nova kriterio de stilo, kiu estas pure Esperanta kaj ne sklave sekvas nacilingvajn modelojn.

Tragedio en la Universo estas originale komuna verko de junaj astronomoj ligitaj al la astronomia Observatorio en Zagreb, dediĉitaj al la afero de monda paco. Sur la frontpaĝo estas informite, ke Ivo Rotkvić esperantigis la verkon el la originala manuskripto. La temo de la verko estas la kosma sorto de nia planedo en okazo de tut-eksterma nuklea milito. Per tiu traduko Rotkvić daŭrigas sur la vojo de lingva evoluo surbaze de la latentaj povoj de Esperanto, kiujn li eĉ pli explore aperigas ol en Cezaro. La eldonisto, Régulo-Pérez, nomis la novan tradukon “majesta fieriga atingiĝo” kaj Rotkvić mem konsideris ĝin lingve supere al la traduko de Cezaro.

Mi estas tiel bonŝanca posedi la Tragedion kun bela aŭtografia dediĉo de la Rotkvić mem. La malgranda volumo de nur 84 paĝoj, la paperaj kovriloj estas iom ĉifitaj, sed la teksto daŭre tenas sian elvokan povon de konvinko pri la unikeco de la lingvo Esperanto. Indas montri specimenon, se nur mallongan, pri la lingvaĵo kaj stilo de tiu eksterordinara libro. Pasaĝeroj de kosma ŝipo vizitas la Teron dezertigitan per la homfarita kataklismo de atommilito. Ili eniras suburban lokon:

“Ili malsupreniras enen. Nuras mallumo, dezertas

stratoj, disdisas objektoj. Nenie io vivanta. La alvenintoj ekkuras tra la mallumaĉajn stratojn, febrosere malkovrante vic-postvicajn galeriojn. Sed ĉie alteruras la sama sceno. Objektoj renversitaj senorde. Sur tabloj jen eklegita libro, jen gazeto apud brulstumpa kandelo. Evidente la loĝintoj de ĉi tiu urbo forpanikiĝis el la subtera rifuĝejo kun la subito, plane neantaŭvidita. La pasaĝeroj tralaŭas la ĉefstraton. Ĉe la fino alobstrukcas vitra konstruaĵo. Sure literoj: La administrejo.”

La du magiistoj de la vortoj, Ribillard kaj Rotkvić, kvankam pasis jardekojn post iliaj forpaso, daŭre tenas siajn meritplenajn poziciojn inter la plej gravaj evoluigintoj de arta Esperanta stilo. Plej bedaŭrinde iliaj verkoj ne plu estas facile haveblaj, sed elektitaj specimenoj nepre meritas esti utiligataj en kursoj de progresantoj.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko, n-ro 3 / 2011, decembro)

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/ribillardrotkvic.html>

La Kimero - Rakonto el la estonteco (13)

-- rakonto de Erik Tantal



Kariero

En la aĝo de sep jaroj, la ĉimpanza superinfano estis sur karia vojo supren. Li evidente ankoraŭ ne atingis la pinton. La unuaj mem parolitaj vortoj de Mojo vekis la atenton de la esploristoj, kiuj tuj rekonis lian potencialon. Superaveraĝe 145, tio estis la kvociento de inteligenteco por Mojo. La instituta administrado tuj decidis forpreni lin el la programo por transplantadoj. Nun prizorgis lin amaso da edukistoj kaj etologiistoj.

La alta talento de Mojo montriĝis per la fakto, ke li tre frue komencis paroli en plenaj frazoj. Krome li

plejparte memstare majstris la bazojn de aritmetiko, skribado kaj legado. Oni donis al li laborpovan porteban komputilon. Per tiu aparato li daŭre plibonigis siajn sciojn. Krome Mojo estis en bona korpa konstitucio. Li estis treege atletika. En la aĝo de ok jaroj li pasis sian abiturientan ekzamenon kaj tiam planis studadon kun fokuso al gentekniko. La longjara bestozorgisto Tim estis nun lia daŭra persona akompananto. Kiel gvidanto, Tim ne nur organizis la partoprenon de Mojo en tenisaj turniroj, li aparte zorgis pri la ĝustaj kontaktoj kun la amaskomunikiloj.

La IBE iom post iom abandonis la projektojn por produkti organojn por transplantado. Neniu volis esti respondeca pri la ebleco, ke iu porko aŭ ŝafo subite ekparolus al siaj esploristoj, aŭ ke iu besto akirus konscion kompareblan kun tiu de homo. Oni plifortigis la provojn por trovi alternativajn metodojn. Tial oni nun ĉefe eksperimentis kun ĉelkulturoj por kreskigi organojn, taŭgaj por transplantado.

Mojo ne ĉesis teni la kontaktojn al la instituto kaj daŭrigis la kunagadon kun prof-ro Brundt, kiu subtenis lin dum liaj studoj kaj eĉ disponigis al li la tutan sektion de la primatoj. Malgraŭ la studado Mojo ĉi tien ofte venis por prigradi sian propran esploradon. Jam post tri studjaroj, li doktoriĝis kaj nun rajtis esti nomata d-ro



Mojo. Lia laboro fokusiĝis al la analizo de la genoj de lia ĉimpanza familio, kun kiu li restis ligita. Tre intense li klopodis ekzameni la genojn de siaj propraj ĉeloj kaj kompari ilin kun tiuj de la homoj.

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo Erik Tantal)

fonto: <http://esperanto-klaus.de/>

(daŭrigota)

el la literaturaj paĝoj de
Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

Boto Ŝtraŭso 1: Pri amo

Historioj kaj maloj

(daŭrigata)

Paroj, korpamikoj

Disiĝa kuniĝo

Sciema knabino eniris, akompanate de viro kiu transdonis al mi informon, sed al kiu ŝi ne intime apartenis kaj kiu poste baldaŭ malaperis sen ŝi.

Ŝi restis sen peto aŭ preteksto sidanta en mia seĝo kaj ridis, kiam mi alrigardis ŝin mute, per rido mallaŭta, vualita rido, kiu apenaŭ kaŝis ŝian pluan intencon. Mi ankoraŭ neniam renkontis ŝin, mi eĉ ne estis kompreninta ŝian nomon. Nun ŝi sidis firme en mia librostalo kaj ŝia reala persono implikiĝis en teksaĵon el sennombraj modeloj, sekretaj atendoj, rezervitaj feliĉoj. La predaĵo aperanta per si mem, surprizas la senagan ĉasiston, envere eĉ primokas lin. Oni unue prisalivas tian kaptajon, tian fremdaĵon per multe da parolo. La buŝo transbordiĝas, kie la okuloj ankoraŭ ne volas tute fidi. Sed ankaŭ la bela knabino ne metas sin artifice en sekreton, male, ŝi deŝarĝiĝas de multe da senĝena babilado pri arto kaj aktualaĵoj. Amasiĝas la opini-aferoj en tia unua horo. Samtempe oni serĉas atente pri la hoko en la ezoko, kiu ie ja devas kaŝiĝi en senkosta oferto. Iam mankon ŝi devas ja havi, alie ŝi ne estus tiel senceremonie ĉi tie. Ĉiukaze okulfrapas, kiel senekvilibre sonas ŝia voĉo, kiel kelkfoje la sekura sonaltecio subite elglitas al ŝi, aperas nekutime fortaj ŝanceliĝoj inter laŭte kaj mallaŭte. Simile al surduloj, kiuj nur malfacile kontrolas sian propran voĉon, ŝi neatendite parolas multe tro forte kaj tro laŭte, kompare kun la modesta enhavo de ŝiaj informoj kaj la proksimeco de la aŭskultanto. Mi ekscias ke ŝi estas ĝemelo. Sed ŝajnas al mi: eble tiu de sia patrino. Ĉar nun ŝiaj diroj subite fariĝas firmaj kaj aplombaj, ŝiaj manoj ne plu afektas, ili forviŝas de la tablo, ili gestumas kiel tiuj de dommastrino plendaĉanta en la ŝtuparejo. Ŝia tuta ŝirmo, ŝia psiĥa

armaĵo, tiel montriĝas nun, estas ŝia patrino, kaj kiam oni levas la vizieron, oni trovas malsupre, en umbilik-alteco, la etulinon, kiel ŝi alten rigardas kun perturbita rigardo. Tiel eble multaj malfortas, kiuj paŝadas libere, devige libere, oni emus diri, ĉar neniu eskapas hodiaŭ la eksteran liberecon de la vivoformoj. Kun dek kvin la unuan fiksan rilaton, daŭris tamen kvin jarojn, kun ĉiuj reguloj de edzeco; kun dudek unu ree tute kaj komplete sola: ŝi surmetas la kufon de hejmo kaj kuirejo, kiam fariĝas malcerte ĉirkaŭ ŝi, kaj sub ĝi ŝi blekas kun panja voĉo. La tuŝiĝoj kun ŝi evoluas al groteska unuiĝo de disiĝo. Mi rimarkas tion ankoraŭ svage, sed mi ne povas tiel rapide eskapi el mia nun jam vekita kaj vigle imagita enamiĝo. Tamen jam ŝia malferma, malplena, nure cedanta buŝo devintus sciigi al mi, ke ĉi tie kun la vortlavango elĉerpiĝis ĉia forto de repliko. Dume mi daŭrigis la vortojn kaj priparolis ŝian korpon per karesoj, ja simple devis adori sole por povi enteni kaj elteni ŝin, la nekonatinon. Sed ŝi, meze de la brakumado, diras subite: "Mi ektimas vin!" Ĉar mi tro entuziasmas laŭ ŝi. Mi apenaŭ aŭdas tion kaj ankaŭ ne povus ŝanĝi, ke mi daŭre timigos ŝin per karesoj. Kun miaj vortoj venis por ŝi en la kuniĝon neriparebla sensencaĵo, kiu ne estiĝintus, se mi regintus ŝin mute kaj se mi mem ne iomete serĉintus rifuĝon ĉe ŝi. Oni interŝanĝas opiniojn, oni diskutas, kaj kiam oni bone elsĉerpiĝis, tiam oni seksumas kune - sed mute, silente! Tio estas ja nur la daŭrigo de leĝera simpatio per aliaj rimedoj. Strange: kiel mi antaŭe pro ŝia ŝanceliĝanta voĉo, tiel ŝi poste eble ektimis pro la ŝanĝo de mia lingvo de tablo al lito, de opinio al konfeso, de anonco al flustrado, de scio al balbutio.



Ŝia edzo

En restoracio iom granda rondo da junaj geviroj leviĝas. Oni pagis, kaj ĉiuj alstrebas la elirejon vigle babilante. Sed nun virino restis sida ĉe la tablo kaj postmeditas pri tio, kian monstraĵon iu ĵus diris. La aliaj staras jam en la ventokluzo de la gastejo, jen ŝia edzo revenas. Ĵus antaŭ la elirejo li rimarkis, ke mankas al li la edzino. Sed jen ŝi jam leviĝas kaj pasas preter li tra ambaŭ pordoj.

Nudeco

Je la sonoro de necerta horo en sia hejmo, post multaj jaroj da laciĝo, da konfuzeco kaj da disiĝoprovoj du homoj alrigardas sin kun malfermegaj okuloj. La rekonado altiras ilin reciproke, dezirego, kvazaŭ fine nur la incitado de ĉiuj seksaj fortoj, kiel revolucio, povus liberigi ilin de la jugo de la komuna historio kaj tiun fini. Fina dezirego enfluas el ĉiuj stratoj, kiujn ili iam laŭiris egalpaŝe. Dezirego, kiun ili mem spertas kiel puran ribelon. Ili brakumas sin kun brakoj de perforto, en kiu ilia intimeco, ilia memoro, ilia senelire longa akompano - en kiu la tuta materio de la kutimo densiĝas kaj kiel estingiĝanta stelo falegas en la nigran de la nudeco.

Unua tempo

Malgraŭ kaj meze de la profunda misagordo aperinta inter ili post disputo kaj pro kiu ili pasigis du tagojn de sia vojaĝo sub la premo de plej ekstrema vortavareco, la virino, kiu ĵus ankoraŭ senapetite pikis en siajn fileopintojn, subite levas la kapon kaj laŭte kaj enamiĝinte kunzumas malnovan furorkanton kiu sonas el la laŭtparolilo de la gastejo. La viro alrigardas ŝin, kvazaŭ ŝi forlasitus de ĉiuj bonaj spiritoj, nun ankaŭ de la mensa logiko.

Ĉiu amo estigas en sia dorso utopion. En nebula pratempo, dorlotata de feliĉo kaj de kantoj, kuŝas ankaŭ la origino de tiu mizera partnereco. Kaj la komenco konserviĝas kiel frostigita, rigidiĝinta momento en la koro de la virino. En ŝi estas ĉiam

ankoraŭ illud tempus⁴, dum en la tempopaso ĉio terure disfalis kaj ŝanĝiĝis. Unua tempo, el fridujo, el frostujo, ne tre nutra vojaĝprovizo.

La urĝo

En sia unua horo du, kiuj ankoraŭ ludas per la komenco, tiom malfruiĝis, ke ili nun, ĉiu returne en sian familion, en sian geedzan kradon⁵, devas hasti tra la fremda urboparto por kapti ankoraŭ metroon, kiu portos ilin hejmen kun ĝuste ankoraŭ nerimarkinda malfruo. La urĝo, la vento, la stumbla kurado liberigas skue la malfiksan konfesion, kiu dum la senmoviĝo ankoraŭ ne volis elveni. Kaj dum ili kuras, la virino je du paŝoj antaŭ la viro, li anhele voĉas ĝin post ŝi. Kun liaj krioj, kiuj efikas kiel la instigaj karesoj de vetrajdisto ĉe la kolo de sia konkursa ĉevalo, la amatino ankoraŭ pli antaŭenrapidas, kvazaŭ la feliĉo donus al ŝi la vipon. En la urĝego ŝi apenaŭ sukcesas returni la kapon por rekrii en la aeron, ke ankaŭ ŝi amas lin. Poste ambaŭ perdiĝas en la homamaso kaj troviĝos nur sekvatage.

(daŭrigota)

¹ *Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.*

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo
*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/Strauss1.html>

Lupo kaj Paŝtistoj / Idolo

fabloj de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

La Lupo en proksim' de besta kort'
Ekvidis tra fendaĵ' en pord',
Ke la plej bonan ŝafon de la grego
Paŝtistoj buĉas en trankvil',
Dum hundoj kuŝas kun humil',
Kaj diris li en la ĉagren' grandega:
"Ho, kiel vi tumultus kun rabi',
Se tiun samon farus mi!»
-- ooo --
En iu templo staris la Idol',
Per orakoloj trafaj ĝi imponis,
Al homoj ĝi konsilojn saĝajn donis.
Pro tiu servo la popol'
Ornamis ĝin arĝente kaj per oro, —
Kaj estis al diaĵo plen-honoro
Per riĉa vest', oferoj, preĝa zum'
Kaj per incensa fum'.
Al la Idolo oni kredis plene.
Sed jen — miraklo kia kaj terur'!
Ekdiris la Idol' stultaĵojn nur:
Respondas ĝi mallerte kaj sinĝene,

Kaj al demando ajna — en malord'
Mensogas ĝi per tute stulta vort'.
Jen homoj pri afer' sincere miras:
"Strangaĵo kia!" oni diras.
Sed estis simpla la sekret':
En la interno de Idol-profet'
Sin kaŝis pastroj por respondo.
Dum sidis en Idol' Prudenta pastro — estis kun
prudent' parol',
Lin ŝanĝis stulta hom' — kaj por popol'
Fariĝis la diaĵ' plej stulta en la mondo.
En la pasinto, aŭdis mi,
Juĝisto iu eminentis;
Li en juĝado tre prudentis,
Dum sidis apud li kun saĝ' sekretari'.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
Ukrainio

Nova poeto ja aperis en Esperantujo ! Li naskiĝis en 1946, estas hispano, kaj loĝas sur la marbodo en Malago (Málaga). Aŭtoro de tri poemaroj (kvara aperota)

- **Mediterraneaj eroj (2012)**
 - **Mediterraneaj eroj II (2014)**
 - **La fontano de l'sorto (2018)**
- kaj cetero de hispanlingvaj sonetoj:
- **Al son de mis sonetos (2014)**



Angel Arquillos Lopez malkovris malfrue en sia vivo la emon sin provi al poezio. Nur post emeritiĝo komencis li, sed tio rivelis en li talenton, riveligis animo, animo homa fronte, mense kaj korpe, al la homa kondiĉo; kaj tiu malfrua alvoko maturiĝis laŭ la jaroj.

Diris La Cido en teatraĵo de Corneille :

«*Junas mi, 'stas vere, sed ĉe bonnaskitaj animoj
Ne atendas valoro l'aldoniĝon de la jaroj*»

Sed Angel montras ke ankaŭ ĉe la aldoniĝintaj jaroj povas aperi poeto, kaj, impresa konstato, la sepdekjarulo havas koron de junulo !

En prezento al lia dua poemaro mi skribis :

“ - *poemoj faritaj el sange pulsanta materialo, vagantaj en la sentoj de animo fronte al sia homa kondiĉo, kaj destino; revante pri ĝojoj, eble fiaskantaj, kun kompatindaj esperoj, en necertaj senelirejoj.*”



Tamen se vi havas la okazon akiri unu el liaj poemaroj, ne hezitu, ĉiam bona verso senfine eĥas, kaj kiel opiniis Paul Valery

«*Ne estas io kiel senco vera de teksto. Publikigita, teksto estas kiel aparato, kiun ĉiu povas utiligi laŭ sia plaĉo.*»

La poeto estas la profeto de l'homa animo, kiel diris Viktor Hugo

«*ho senprudentulo, kiu kredas, ke mi ne estas vi !*»

Liaj eldonitaj poemaroj malfeliĉe jam elĉerpitas, kaj ne plu aĉetebblas (restas nur atendi, ke ia antologia reeldono aperu).

Feliĉe pluraj el lia poemoj aperis en Turka Stelo kaj en Sennaciulo, ankaŭ en Irana Esperantisto (vi povas ĝin elŝuti kaj malkovri : <https://dl.espero.ir/revuo/IE-35.pdf> (sur paĝoj 14 kaj 15).

Jen tri pliaj:

LA MARO (prozpoemo)

La maro serenas dum ĉe la horizonto droniĝas reĝo, kaj sur la boatoj flugadas mevoj kaj muta venteto karesas la ŝvitajn vizaĝojn de maristoj kaj banistoj kaj delfenojn. Estas la komenco de la fino aŭ fino de la komenco, ĉar la vivo daŭras. Mi dormemas.

Arquillos marto 2020

Sidanta sur brakseĝo
Mi sentas, ke la koro
Batas kun maltrankvilo
Kaj hezitema movo.
Mi sidas kun timemo
Retenante larmetojn,
Ĉar mi vivas la vivon
Per vera sentimento.

Arquillos aŭgusto 2020

sed dubo pri Di' ne forestas
ĉar ene de mi dubo estas.
Dion regantan la mondon,
mi vidas en la spegulo,
mi vidas sur blanka tabulo,
sur mia littuko, surplanke,
sur griza malhela ĉielo,
Ĉar Dion mi vidas konstante.
Sed Dio neniam min aŭdas,
Li ĉiam silentas,
neniam rigardas...

MI GAPADAS

Mi sidas sur brakseĝo
Gapante vian ombron
Dum via korp' forestas...
En ĉi stelplena nokto.
Mi timas la solecon
Kaj la sinuan sonon
De la trumpet' arĝenta...
Ludanta mian sorton.

AL DIO MI PREĜAS KUN TRISTO

Al Dio mi preĝas kun tristo,
kaj petas de Li Lian benon,
sed mi dubas pri Dia ekzisto...
Mi pensas pri Li tutan tempon,
angore, malgaje kaj kun malbona sento.
Al Dio, kun malĝojo mi preĝas,
miraklon el Dio mi celas,

mia kara Dio forestas!
Forestas ĉi Dio, misteras,
pro tio, poemon mi verkas,
ĉar en poezio, kun la fantazio,
nenio malveras,
kaj ŝajnas ke Dio aperas
kaj kun mi kunestas.

Arquillos januaro 2013

ONI MURDIS TITO-n! TITO ESTAS MORTIGITA!

La novaĵo disvastiĝis. Nenio alia krom la murdo de granda gvidanto de la ruĝa federacio. La novaĵo venis fulme ankaŭ en la suda regiono, kie li samtempe estis malamata kaj dezirata freneze de la serba gvidantaro.

La murdisto verŝajne estis albano. Albanoj mortigis la grandan gvidanton, murmuris la komunistoj, konvinkitaj, ke la kulpulo estis ja albano el Kosovo.

Baldaŭ la novaĵo venis ankaŭ en la vilaĝo Llagam, kiu situis inter montoj kaj ne multe sin distingis de la ceteraj najbaraj vilaĝoj. Ĝi ja havis la samajn ĉagrenojn kaj montojn. Kvankam la novaĵoj atingis la vilaĝon kutime malfrue, ĉi lasta, pri la murdo de la gvidanto, supreniris montojn pli rapide ol la aliaj.

Llagamanoj, precipe la maljunuloj, ŝokiĝis pro la novaĵo, ke Tito ne plu estis viva. Ili ariĝis ĉe granda abio por pridiskuti kaj ekscii kiel tio estas okazinta. Ili demandis sin kio okazos nun al ili? Estis ili scivolemaj pri la persono kiu murdis la ruĝan sultanon. Ili atendis longajn horojn iun, alvenonta el la urbo, por alporti novaĵojn. Senpacience ili atendis por ekscii kio okazis en la granda urbo kaj kiu do murdis Tito-n.

Ĉe la fino de la strato, ili ekvidis Ferat-on, revenante el la urbo. Ne plaĉis al ili tio, ĉar Ferat parolaĉis fuŝe kaj ne estis fidinda. Li mokis pri ĉio kaj ĉiu. Eĉ pri si mem. Li mokis pri la morto, same. Tial la vilaĝanoj ne aprezis lin. Ili foriris de li samkiel de iu frenezulo, ĉar ne volis trompiĝi. Tamen, li estis la sola, revenanta tiutempe el la urbo, do ili alproksimiĝis lin por ekscii ion.

- Kion oni diras en la urbeĝo, Ferat? Kio okazis, do? - demandis Ferat-on la plej maljuna viro, el tiuj kunvenintaj ĉe la granda abio, konscia, ke la unua demando apartenis al li mem.

- Nenio, je Dio, onklo Feka! ¹ La homoj sidas kaj admiras ĉirkaŭe. Kion ili faru do!

Ferat estis laca pro la vojo trairita surpiede kaj volis eviti la demandojn, por ke li plej baldaŭ atingu sian hejmon.

Tia konduto kolerigis la vilaĝanojn, tamen ili ne lasis Ferat-on ĉesigi la babiladon en tiu eksterordinara kunveno.

- Diru, ni petas, ion! Kial vi hastas tiel? - laŭtvoĉis Brahim, samaĝulo de Ferat.

- Kial mi sciigu vin detale pri kio okazas en la urbo?! Iru vi fojfoje tien kaj vidu kio okazas.

Ferat mem ankoraŭ ne eksciis pri la novaĵo

disvastiĝinta tiel multe. Li ne renkontis iun en la urbo kaj revenis vilaĝen tutsole. Nenio do estis rakontinte lin ion.

- Oni murdis Tito-n - maltrankvile sciigis lin Brahim, malkovrante la aŭskultitan novaĵon.

Ferat surpriziĝis. Tamen, post kelkaj momentoj, li supozis, ke tio estus unu el la falsaj novaĵoj verkitaj en la vilaĝo. Okazis ankaŭ pasinttempe, ke kelkiu lanĉis malĝustan parolon kaj la tuta vilaĝo sin okupis per tio.

- Ĉu oni scias pri la murdisto? - demandis Ferat-on la dua maljunulo, staranta ĉe la plej maljuna.

La dua maljunulo portis cigaredon surele, ĉiam preta por ekbruligi ĝin.

- Dia malfeliĉo! Granda malbono okazos - konstatis tiplene la tria maljunulo, staranta ĉe la dua maljunulo. Li estis la sola, tenanta blankan bastonon, ĉar la ceteraj tenis kafkoloran.

- Oni ja scias kiu murdis Tito-n - komencis sian babiladon la mokanto, Ferat.

- Kiu do...? - aldiris lin unuvoĉe kaj maltrankvile la vilaĝanoj.

- Mi ja!

- Kiel do?!!

- Mi ja murdis Tito-n!

- Kion vi diras, junulo?! Ĉu vi estas konscia je tio?!!

- Mi estis en Belgrado kaj murdis Tito-n. Nenion alian aldiris lin, nur mi demandis ĉu li estas kun mi aŭ ĉu kun Fadil ². Tito respondis, ke li estas kun Fadil kaj mi ne pardonis kaj murdis tuj lin - daŭrigis sian mokaĵon Ferat kaj ridis pro la timo kaŭzinta al siaj vilaĝanoj.

- Vi ne povas ŝerci kun tiaĵoj, junulo! - aldiris lin admone la plej maljuna viro.

- Krom nin, ne diru tion al iu ajn alia - aldonis la dua maljunulo.

- Dia malfeliĉo! Granda malbono okazos - ripetadis la samajn vortoj la tria maljunulo.

Morgaŭe, la vero malkovriĝis. La novaĵo estis falsa, Ne estis ja ĝi vilaĝa inventaĵo, kiel supozis Ferat, sed granda mensogo, turbulinta la tutan Jugoslavion, ekde la slovenaj Alpoj ĝis la montoj de Sharr ³. Ankoraŭ oni ne eksciis pri ties fonto, kio kaŭzis ĥaoson unutagan en la federacio. Tamen, al la vilaĝanoj de Llagam ne impresis la malkovro de la fonto. Grava estis, ke Tito vivas kaj ne eksplodos, sekve, neatendita milito, io malfeliĉa aŭ malbonega, kiel sin esperimis ripeteme la maljunulo kun la blanka bastono.

Ankoraŭ ne pasis plena semajno kaj milica veturilo venis en la vilaĝo. Ĝi haltis ĉe la hejmo de



Ferat. Milicisto ekfrapis sur ties pordo per la fusilaj tuboj. Frapis li unufoje, dufoje kaj, ankoraŭ ne provante trian fojon, la dommastro malfermis la pordon.

- Ni aŭdis, ke vi estas murdinta nian vivan heroon, kamaradon Tito - ridetis la milicistoj cinikeme al nia rolanto, kiu ekstremis pro la timo.

- Kiel vi murdis lin? Per unu kuglo, du kugloj, tri aŭ pli multe?

- Mi neniam intencis ion malbonan, kamarado komandanto. Mi nur ŝercis kun la vilaĝaj maljunuloj - parolis Ferat kun tremantaj kruroj.

Tion rimarkis ankaŭ la milicistoj, kiuj daŭrigis.

- Vi mokis nian grandan gvidanton! Ŝercis kun tiu, kiu subigis la faŝismon, ĉu?! Hontu, vi, kamarado Ferat! Ni neniel pensis, ke via stulteco atingus ĝis tia skalo. Vi estas pli fia ol la kulakoj ⁴ aŭ ballistoj ⁵. Ni ja konsideris vin nian kamaradon. Hontu vi! Hontu! Centfoje hontu!

- Kamarado komandanto - vi bone ja scias kiom multe mi amas Tito-n. Eĉ mian patron mi ne amas kaj respektas tiel multe!

- Kion vi diris?! Vi paralelas nian grandan gvidanton kun via patro?! Kiu estas via patro, ke vi respektus tiel multe kiel Tito-n? Neniu! Iu malafabetulo, kiu trafis vivi en la sama ŝtato kun Tito.

- Kamarado komandanto, mi ne diris tion...- provis aldoni ion Ferat, sed la timo kaj la tremado de la kruroj pliiĝantaj, ne lasis lin sin pravigi.

- Ne diru ion plu! Venu kun ni al la milicejo! Unue, vi devas liveri deklaron, poste ni vidu kion ni faru kun vi.

- Mi petegas vin, kamarado komandanto! Mi havas etajn infanojn- petadis Ferat, kvazaŭ infanon, antaŭ la ĉefmilicisto, esperante, ke li bonkomprenemus lin. Sed tio estis vana. La ceteraj milicistoj puŝis lin perforte kaj devigis lin enaŭtiĝi.

Kiel oni ekspektis, Ferat sin prezentis antaŭ la juĝejo. La juĝisto vidis antaŭ si homon elĉerpitan pro la batado. La signoj postrestintaj survizaĝe atestis, ke la milicistoj ne hezitis forbati la vilaĝan mokiston, kiu ne ŝparis eĉ la grandan gvidanton Tito. Samkiel la milicistojn, similajn demandojn faris ankaŭ la juĝisto,

surprizita, ke Ferat, simpla vilaĝano, aŭdacis lanĉi el sia buŝo tiajn vortojn.

- Kamarado juĝisto. Tito estas grandanima. Li pardonas kulpulojn! Se li estus juĝisto, certe li pardonus mian kulpon! Ne farus li malbonon al sia filo, kiu pretas ja morti por li!

La juĝisto ekridis kaj verŝajne aprecis la manieron per kiu sin pravigis Ferat. Li miris kiel homo el la perdiĝinta vilaĝo inter montoj povus posedi tian menson komplimenteman kaj ruzan.

Ferat eliris senkulpa.

Li promenadis orgojle tra la urbo kaj la vilaĝo. Nun, krom la mokado kun la ruĝaj gvidantoj, li eĉ mallaŭdis ilin. Li esprimis sian koleron per lingvo neniam aŭdita eĉ de la plej severaj ballistoj. Li diradis, ke li venĝos pro la torturoj faritaj al li dum tiuj du tagoj de restado en la antaŭprizono.

Oni diras, ke li interkonsentiĝis kun la juĝisto, kun kelkaj el la urbaj gvidantoj kaj la ĉefmilicisto, ke li mokadu kaj mallaŭdu senŝpare ilin, ne bridu sian buŝon neniumomente. Li estis interkonsentita, ke poste rakontu ilin precize kiel reagis la homoj, al kiuj plaĉis kaj malplaĉis liaj vortaĉoj.

Ferat ĝuadis plenan liberon mokadi la ruĝajn ŝtatpotenculojn. La gvidantoj de la urbo enprizonigis lin provizore, por ke ne malkaŝu la sekretan interkonsenton kun li kaj la ludo ŝajnu kredinda. Ferat estis bezonata ankaŭ ĉe la prizonoj...

¹ *Karesa nomo por Ferat*

² *Fadil Hoxha, tiama plej alta kompartiano en Kosovo*

³ *Granda montoĉeno inter Kosovo, Norda Makedonio kaj Albanio*

⁴ *Kulakoj estis deklaritaj riĉaj kamparanoj en la eksaj komunismaj landoj*

⁵ *Ballisto nomiĝis la antikomunistaj partizanoj en Albanio dum en Kosovo nacionalistoj*

Rakonto de Adil Olluri

Enesperantigis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio la 7-an de oktobro 2019

19>> siajn geamikojn kiel kutime pere skype, kiam li ekvidis hundeton vagantan. Li atente kaptis ĝin kiam li ekvidis knabon kriantan iun nomon, verŝajne de tiu besteto 'Paŝko, Paŝko' serĉante ĝin tra la parko. Mi donis la besteton al la knabo, kiu klarigis al mi, je mia demando 'kie li loĝas', ke li telefonis al sia patrino, por ke ŝi atendu lin ĉe lia lerneja kamaradino Sara Martoviĉ.

- Do, diris Sara ride, la sama nomo kiel mi nomiĝas!

- Sed kiel estas sama, eĉ ŝia familia nomo! miris

ĉiuj.

La hundetoj, kiel ĉiu besteto kuris eksteren salti laŭ korto kune kun hundoj de Jana kaj Petro. Al la gajaj hundetoj aliĝis la ĵus vekigintaj tri ursetoj.

(fino de la oka parto)

verkis kaj sendis **Miriĉ Jadranka** el Serbio

Nu, tri vortoj antaŭ kiuj vi verŝajne dirus: “Kaj sekve? Pluraj homoj trairas tiun vojon.”

Jes, eble, sed miakaze tiuj vortoj estas tiom kunigitaj, ke ili formas apartan trilogion. Ĉu vi permesu min mencii, ke ili tute ne similas al mia trilogio en la malta lingvo publikigita antaŭ kelkaj jaroj, kie tri romanoj priskribas tri apartajn rakontojn. Mi nomas ilin ‘trilogion’ nur ĉar la romanoj, ĉiu aparte, trovas sian lokon sub unu el la tri diversaj Grand-Majstroj, nome: *Pinto*, *Ximenes* kaj *Hompesch*, kiuj regis Malton dum la lasta periodo de la kavalira regado, kiu krome neniiĝis per la apero de Napoleono en Malton en 12 junio de 1798.



Grand Majstro Pinto



Napoleono



La francoj sub la gvido de Napoleono preparas sin surterigi por konkeri Malton.

bruega jes, sed belega. Tien mi ofte iris aŭ por skribi leterojn aŭ por iom legi.

Unu tagon min apudiĝis maljunulo, kiu rigardante min kurioze, diris : “Vi ne estas franca!”

Mi ne povis nei, li certe min rekonus pro la tono,

pro la vortoj uzitaj, ktp.

Li aldone ekdemandis, “Ĉu iam vi enhospitaliĝis.” Mi ekridis: “Ĉu ne preskaŭ ĉiuj homoj iam en sia vivo enhospitaliĝas?”

“Jen, do vi konsentas. Miaparte dum miaj lastaj dek jaroj mi devis gustumi tiun malavantaĝon dufoje.”

Li tuj ekrakontis pacienceme.

Miaflanke mi estis sufiĉe libera kaj, aŭskultante lin malpenigante la koron ne sufokus

mian vivon. Aŭskultante aliajn, precipe maljunulojn, rakonti siajn travivaĵojn estas karitata kaj psikologia laboro, ĉu ne?

Ĉi maljunulo tuj sidiĝis apude, en tiu loko konstruita de la lokanoj por memori la venkojn de *Napoleono*. Krome ĉi loko nomiĝas ankaŭ “*Place Charles de Gaulle*”. Meze vidiĝas la tombo de la nekonata soldato de la unua granda milito.

Nu la maljunulo ekparoladis. “Permesu al mi rakonti, ke antaŭ ok jaroj oni operaciis min ĉe la dorso pro glitita disko. Nu mi troviĝis hejme sola kuirante. Mia edzino iris al *Place des Vosges* por aĉeti manĝaĵojn. Subite nesuportebla doloro, kvazaŭ iu alĵetis sagojn al mia maldekstra kruro, ekskuis min. Kion fari? Mia kapo malplenis. Subite aperis antaŭ mi la poŝtelefono. Mi tuj avertis mian edzinon: «Kara, venu tuj, mi ne povas marŝi, netolerebla doloro.» Mi telefonis ankaŭ al miaj filoj, kiuj feliĉe atingis min post nelonge malgraŭ ke por transiri la stratojn de Parizo ne estas tiel facile. Sed ili ja alvenis.

«Mallonge,» li daŭrigis, «oni operaciis min post du tagoj, sed eĉ pli poste mi daŭrigis senti doloron ĉe mia lumba regiono. Nu, ĉio, tio okazis jam antaŭ ok jaroj. Krome, alian fojon...»

“Alian fojon?” Paciencon rilate la maljunulojn.


Li daŭrigis: “Estis dimanĉe la 24an de marto. Mia edzino petis glason da varma ĉokolado. Apudiĝante ŝin, mi sentis, ke iu supren puŝis min ĵetante min teren. La glaso disflugis el mia mano. Mi falis sur mian



La Triumfa Arko



Generalo Charles de Gaulle



Viktor Hugo

maldekstran flankon, kiu neniel doloris. Kio okazis, okazis ĉe la dekstra flanko. Ambulanco!

Post du tagoj oni min operaciis. La operaciisto deklaris, ke la dekstra kokso-osto ekkrakis dum mi ankoraŭ staris; estis ĝuste tiam, ke mi ekfalas. Laŭ li, li ne ŝanĝis la tutan kokso-oston sed nur duonon. La vorto uzita estis: hemiarthroplastio.

Mi ekridis.

“Ĉu? Ĉu tio estas ridinda?” demandis la maljunulo.

“Bonvolu, sinjoro, ne miskomprenu min. Mi ekridas pro la scienca vorto. Tiu vorto kaj similaj estas tute kompreneblaj nur al kuracistoj aŭ sciencistoj. Ili estas enpruntitaj el la greka lingvo kaj poste tiel kneditaj, por ke oni povu uzi ilin en medicino. Oni ilin ne trovas krom en la medicinaj libroj.

“Nu,” daŭrgis la maljunulo, alia martireco sin prezentis, nome la ‘post-op’ (post la operacio) nome la terapio, torturo(!) sed sen ĝi neniuj progresoj fariĝus.

“Do... domo... hospitalo kaj reen. Ĉi tiu ‘reen’ mi ne povas ekspliki, malta amiko.”

Mi denove ekridis.

“Fine, aŭskultu ĉi tion, por ne daŭrigi vin ĝeni. Iam mi aŭdis anglon, tie, rigardu, rigardu iomete ĉe la alia trotuaro aliflanke, ĉu vi vidas tiun ambuloncon, tie li staris kaj diris: ‘La futuro gvidmarkas.’ Mi ankoraŭ memoras tion.”

“Ĉu vi scias la anglan, sinjoro?”

“Kompreneble. Kial ne?”

La vivo estas farita el monto-pintoj kaj valoj, unu post la alia, tra kiu la destino devigas nin trapaŝi. ‘Maktub’ diras la dezerta beduino; ‘In manus tuas’ (en vian manon, t.e. Dian manon) kantas la katolika eklezio.

lel, kial ne daŭrigi lerni? Iam *Henri Ford* diris: “Kiu haltas lerni estas jam maljunulo, ĉu dudek-jara ĉu okdek.”

“Kioma horo estas, malta sinjoro?”

La maljunulo rigardis sian horloĝon kaj skuis sian kapon. Nur la duan posttagmeze. Eble por li, ripoztempo. Mi ne sciis, sed por mi se mi reirus al la hotelo por ripozi mi disperdus kaj la monon kaj la tempon. Mi ne volis pasigi la tempon interne sed ĝui la parizajn belecon kaj Arton. Memoru pri “*Parigi, O Cara!*” (Kara Parizo!) el la belega dueto de la Opero Traviata de Verdi.

Jen, jen, alian fojon la policaŭtoj senhalte tra la stratoj!

La maljuna franco svingis sian manon kvazaŭ por saluti ilin kaj stariĝis. Mi pensis, ke li forlasos min, tamen jen li malfermis paper-saketon kaj el ĝi eligis kornan bulkon; li ofertis al mi sed mi ne akceptis. Korna bulko ne estas grandaĵo.

Tiam pasis antaŭ mia memoro grandiozaj scenoj el la franca historio, kiel ekzemple la kadavro-triumfo de la konata aŭtoro *Viktor Hugo*, post lia ekzilo; la ĉeesto de generalo *De Gaulle* post la dua modmilito, krom la ĉeesto de *Hitler* kiu vizitis la lokon por plifamigi sian nomon dum la dua granda milito.

Kaj mi haltu ĉi tie, amikoj legantoj, ĉar la franco foriris sen saluti, kvazaŭ li neniam renkontis min. Dio lin helpu. Laŭ lia rakonto, li dufoje foriris el sia domo al la hospitalo kaj reen. Sian tezon li bone prezentis.

Gratulojn, gesinjoroj maljunuloj, *ad majora* (ĉiam alten). Ne maljuniĝu, mi petas!

verkis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto

Peter Zilvar (2014)



Peter Zilvar, kraĵono, ovala sur DIN A 4, 2014

Peter Zilvar admirinde engaĝas sin ĉe le organizado de la Esperanto-Centro en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz, kun Esperanto-biblioteko,

Klerigado de Esperanto-instruistoj, por la fakekspozicioj en la Esperanto-sekcio de la Welf-kastelo, ktp.

sendis Helga Plötner el Germanio

Kune kun la hungardevena Zsófia Kóródy, prezidantino de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj, ili eksterordinare sukcese organizas naciajn kaj internaciajn kongresojn, seminariojn, ktp.

Vidu ĉe: <http://esperanto-urbo.de>

Dum la Esperanto-Mondkongreso en la jaro 1999 en Berlino (2600 partoprenantoj el 64 landoj), mi prezentis miajn pentraĵojn en IKC (Internacia Kongreso-Centro). Poste mi komencis mian klerigadon kiel Esperanto-instruistino. Jam de 2000/2001 mi kun ĝojo estris kvar Esperanto-kursojn ĉe mia distrikta popolaltilernejo. Tio okazis dum la „Jaro de la lingvoj“ kaj estis pliriĉigo por mi. Krome dum jardekoj mi laboris kiel docentino por artkursoj.

Ofte mi estis en Herzberg kaj interkonatiĝis kun



Peter Zilvar, Petro. Mi ekŝatis lin. Li tiom flue parolas Esperanton kaj li ĉiam estas en agado.

Volonte mi volis skizi resp. pentri lin, almenaŭ foti lin. Dum jaroj mi ne sukcesis. Eĉ ne unu foto taŭgis, pro manko de la kvalito, tro da distanco aŭ tro eta distanco.

Okaze de la 91a Germana Esperanto-Kongreso en Erfurt dum Pentekosto 2014 mi denove renkontiĝis kun Peter kaj Zsófia. Ili varbis por la Esperanto-urbo kaj la Esperanto-Centro. Je la fino de kongreso kolektiĝis la partoprenantoj en la korto por la profesinivela grupfoto. Per mia fotoaparato mi sukcesis foti Peter kaj Zsófia. Mi montris al ili la fotojn sur la ekrano. Ili plaĉis al ni kaj ili taŭgis kiel bazoj por miaj intenciitaj portretdesegnaĵoj. Kun ĝojo mi desegnis ilin detale kaj amplene per diversaj kraĵonoj.



Postvorto

*Zsófia Korody,
kraĵono, ovalo sur DIN
A, 2014*

Okaze de la 92a Germana Esperanto-Kongreso je Pentekosto 2015 en Hameln mi montris en la kongressalono sur la

prezentomuroj mian ekspozicion. Peter Zilvar volis aĉeti de mi la sukcesan portretdesegnaĵon. Mi donacis al li diversajn preparitajn kopiojn de la portretdesegnaĵoj de li kaj de Zsófia Kóródy, kaj diris al ili, ke mi ankoraŭ mem volas konservi la portretdesegnaĵojn de esperantistoj por eblaj postaj ekspozicioj. Tiun ĉi desegnaĵon de Peter Zilvar mi mem taksas kiel artisme esprimriĉan kaj kvalite altvaloran.

Dum la televidoprezentado de TV-kanalo MDR-SA en marto 2015 en galerio Ratswall en Bitterfeld oni prezentis unue tiun ĉi desegnaĵon, ĉar ĝi vere impresis la kameraiston.

En la libron Esperanto por mi, 16 esperantistoj portretitaj de HELGA PLÖTNER de HORIZONTO en la unua eldono la 20-an de julio 2020 estas tiu portreto de Peter ZILVAR en pagxo 16 kun eseeto de Peter Zilvar kaj en Numero 6 nia kara Zsófia Korody, ili laboras en nia Esperantocentro en nia Urbo Herzberg apud Harco, en Germanujo.

sendis **Helga Plötner**, portretpentristino el Germanio

26>> paroladon mi.

– Mian intencon mi rakontis al Marija, sed tiu prenis piĝamon kaj foriris el nia dormoĉambro... La amo al mi estas afero sankta! Kun amo mi plenumas ĉiujn laborojn, sed sen amo mi eĉ fingron ne povas ekmovi... Do jen, mi kuŝas, kiel ŝtono apud vojo... - Staseo forturniĝis al vando kaj ekploris... La ploro mildigas koron.

„La piĝamo!“ - eknestis en mia kapo. Mi drinkigis al Staseo restaĵon de la boteleto-havo kaj enanime kantis - „venkinte la ŝtormojn, vi navigu-revenu, amu kiel amis antaŭe, amu kaj venu...“.

– Marija! - mi turnis min al ŝi, tamen ŝi ne rigardis al miaj okuloj.

– Marija, kie estas via piĝamo..., - interesiĝis mi.

– En mia ĉambro...

– Marija, prenu vian piĝamon kaj iru en dormoĉambro al via edzo Staseo kaj tion faru ĉiutage!

– Bele sonas..., - diris Staseo. Li ĉion komprenis kaj nenion demandis. La okuloj de Marija radie brilis.

– Do... ĉu... ĉelume? – nervoziĝis ŝi kaj diris nenion pli.

– Homo ne estas besto – li devas vidi vizaĝon de sia amatino, - daŭrigis mi.

– Bonaj vortoj..., - diris Staseo. - Mi bonege min sentas... - kaj ridis li...

– Ĉu ĉio bonas? - ripete demandis mi.

– Ho, jes. Mi scias, kion necesas diri.

La unuan fojon mi eksentis plezuron, ĉar mi helpis al la homoj solvi familian problemon.

Mi iris hejmen kaj feliĉe observis reklamojn kaj vizaĝojn de la preterpasantoj. La vetero pliboniĝis, jam ne plu pluvis. Mi sentis, kaj enanime ĉe mi blankis, blankis. Kaj promenadi mi ne plu volis... Laciĝis mi.

Tiuj aĝaj homoj estas kiel etaj infanoj, Dio scias!

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

Vintraj ferioj pasis tre rapide . Tamen ĉi jara vintra sezono distingigis de la pasintaj . Io stranga okazis. Homoj tre rapide malsaniĝis kaj ĉiu miris je kia speco de viruso kaptis ili.

Baldaŭ la tuta ter globo estis infektita de tiu nekonata viruso Sed scienculoj kaj medicinaro ne sidis nenion faranta. Kaj fine ni estis sciigitaj pri tiu nova virusa pandemio .

Sara jam havigis maskojn kaj gantojn por surmeti ĉiam, kiam ŝi estis elironta eksteren. Ekzemple : iri al bakvendejo aŭ al verda merkato por havigi nutraĵon por la doma bezono. Kompreneble, ĉiuj eliroj estis reduktitaj. Muzeoj, kinejoj, teatrejoj restis fermitaj kaj same okazis en sportaj terenoj. Do, restis ni hejme!

Al Sara kun siaj amikoj tri ursetoj, testudo, ora fiŝeto kaj hundetoj estis ĉiam interese kaj vigle. Same okazis kun ŝiaj geamikoj... Ili amuziĝis per komputilo rigardante unu la alian skype.

Por ke ne enuiĝu ili ĉiam ekpensis iun ludon kiun ili devas plenumigi dum la tuta semajno.

Ĉi-semajne Sara estis devigita baki kuketojn, kaj Pavlo devas ĉiu postagmeze reciti aŭ deklami iun poemon laŭ lia elekto. Jana kaj Petro estis devigitaj ĉi-semajne promeni la hundetojn dum la permesita tempo: ekde la oka vespere po unu horo aŭ je la 23-a horo antaŭ noktomezo ĝis la 1-a horo post noktomezo.

„Jen, ĉio estis preta, ekpensis Sara. Eble, baldaŭ venos Jana kaj Petro. Baldaŭ ili estas revenontaj kun hundoj. Pavlo kutimis legi la poemojn ĉirkaŭ la naŭa vespere.

Sara vestis sian favoratan jupon, kombis la harojn kaj iomete ŝminkis ruĝete la lipojn. Ŝi trankvile atendis telefonvokon de Pavlo.

Subite eksonoris la domopordo. Ŝi kuris malfermi la pordon

- Kiu vi estas – demandis ŝin iu nekonata virino.

Sara estis surprizita tamen respondis trankvile:

- Mi estas Sara. Mi ne konas vin! Kiu Vi estas?

La nekonata virino prezentiĝis kaj mallonge rerakontis al Sara kio okazis. Nome, ŝia fileto Jan eliris ekster la domo promeni la hundon. Li renkontis sian kamaradon kaj ili interŝanĝis kelkajn vortojn. Dume la hundeto ĝin liberigis kaj saltetis al apuda ligna kabano. De tie li malaperis. Ŝi rerakontis al Sara tiun okazaĵon ĉar lia fileto diris telephone al ŝi ke ŝi atendu lin ĉe la domo de Sara.

- Sed mi vin ne konas, kiel li diris al vi mian nomon!

- Mi ne scias kara. Mi faris kiel estis dirite .

Sara kaj la najbarino sidiĝis en la salono atendente novaĵojn.

Dume tri ursetoj ekflaris la bakaĵojn. Ili tre ŝatis manĝeti bakitajn kukojn, kiuj estis surverŝitaj per mielo kaj citrono. La urso kaj Bluokula klaŭno kaŝe iris en kuirejon kunportante subbrake la longan teleron plena je mielaj kuketoj. Ili kaŝis sin malantaŭ la domo kaj dolĉe manĝis pli ol duonon da mielaj kuketoj.

Dume Sara kun la najbarino zorgeme atendis la telefonvokon de Jana aŭ de Petro. Baldaŭ ili revenos hejmen, ŝi ekpensis. Tiun momenton ili aperis sur la domopordo.

- Jana, kial vi ne vokis min? Kiel Petro ne vokis se vi ne povis? - mire diris Sara.

Jana kaj Petro surprizite rigardis ŝin kaj la nekonatan virinon. Petro frotis la manojn kaj subokule rigardis ilin.

- Kial mi voku vin? demandis Jana ŝian amikinin aldonante:

- Vi ja, sciis kien ni iris kaj kiom da tempo ni estos ekstere promenante niajn hundetojn – diris Jana ankoraŭ embarasinta.

- Ĉu vi, do, ne konas la sinjorinon? Ŝi montris fingre al la najbarino sidanta en fotelo.

- Ne , vere mi ne konas ŝin - Jana turniĝis al la najbarino...

Tiam la najbarino stariĝis kaj ekiris al la dompordo. Ŝi malfermis la pordon kaj legis kion estis skribita sur la kupra disketo:

- Sara Martoviĉ. Jen, vi estas Sara Martoviĉ ŝi turnis al Sara, kiu kapjesis kaj diris:

- Jes, ni antaŭ ol devas atendi vian fileton eble li klarigos al ni kio okazas. Venu, ni ĉiuj sidiĝu kaj mi preparos kafon kaj teon por sinjorino, por ke vi iomete refreŝiĝu.

Veninte en la kuirejon Sara tuj vidis la duonplenan teleron.

- Ho! mi scias, kiu ŝtelis la kuketojn. Ĉi- foje vi ne trompos min! diris Sara kurante al la domokorto, kie troviĝis la tri ursetoj. Je ŝia surprizo ili kviete dormis kaj apud ĉiu restis po unu kuketo.

- Ha! mi trovis vin... Kion... - ŝian demandon haltigis la forta voĉo de Petro.

- Saraaaa, tuj venu!

En la salono kolektiĝis Jana, Petro, Pavlo kaj la nekonataj sinjorino kaj knabo, kiu forte tenis hundeton en mane.

- Ho! Pavlo de kie vi venis? Kaj kiu estas tiu bela knabo! gaje diris Sara.

Pavlo klarigis ĉion. Nome, li hastis hejmen por vidi



*La palaj fingroj
jen sorĉadas la klavojn.
Luna soneto.*

*Maldolĉa kafo.
Aromo de Ŝanelo.
Forpasis Ŝi!*

*Aŭtuna trompet'
sur la kampo malĝojas.
Oriol' ploras!*



verkis kaj sendis
Ivaniĉka Maĝarova
el Razgrad, Bulgario

*Sur la balkono Ŝi.
La alajdo kantegas.
Roza estas tag'.*

*Kaŝrigardas lun'
sur silentiĝa urbo.
Ekdormas nokto.*

*La kvarmanego
amiko de la homo.
Ĉiam fidela.*

*Siringo odoras
en poeta ĝardeno.
Aŭguras Amon!*

*Printempa pluvo
ruĝajn tulipojn banas.
Guto de roso.*

*Printemp'. Pluvas.
De sudo flugas birdoj.
La tero frukta.*

*River memoras
niajn pekajn noktojn.
Karegmemoroj!*

*Sudvent'ekblovas.
La arbaroj folias.
Trilas la nestoj.*

*Disaltaĵsubir'
en fenestr'kaŝrigardas.
No, lunleviĝas!*

LA BAZA LEĜO ESTAS AMO

-- libro recenzo de Georgi Miĥalkov el Bulgario

Elena Popova: Leteroj el la Kosmo. Tradukis en ĉinan lingvon Zhuang Qixiong. Ilustris Ina Nikolova. Lingva konsilanto Rob Moerbeek – Nederlando. Eldonis: MATADOR 74, 2020.

Elena Popova estas unu el la plej aktivaj bulgaraj esperantistinoj. Dum pluraj jaroj ŝi verkis multajn librojn, artikolojn, tradukis el Esperanto en bulgaran lingvon. Aperis pluraj ŝiaj eseoj pri elstaraj bulgaraj esperantistoj kaj tiel ŝi prezentis al la monda esperantistaro la agadon de bulgaraj esperantistoj.

Antaŭnelonge eldonejo "Matador 74" eldonis novan neordinaran libron de Elena Popova, kies titolo estas "Leteroj el la Kosmo". La unika libro estas dulingva – Esperanta kaj ĉina. Dum la lastaj jaroj ne aperis libro el bulgara aŭtoro en ĉinan lingvon kaj tial "Leteroj el la Kosmo" estas evento por la nuntempa bulgara literaturo. Pri tio pli da bulgaraj legantoj devas esti informitaj. "Leteroj el la Kosmo" estas infanlibro, tamen ĝi vekas la atenton kaj la intereson same de la plenkreskaj geesperantistoj. La ĉefrolulo Nik vojaĝas en la Kosmo kaj li verkas leterojn pri la diversaj planedoj, kiujn li vizitis. Liaj leteroj montras al la legantoj ne nur belegajn planedojn, mirindajn estaĵojn, sed ili estas riĉaj je valoraj pensoj, meditoj kaj impresoj.

Elena Popova scipovas talente veki la infanan fantazion. Lerte ŝi gvidas la legantojn al la mirinda mondo de la imago. Per la vortoj ŝi kreas interesan allogan ludon. La verkistino ne edifas, ne konsilas, ne altrudas al ni siajn meditojn kaj konkludojn. Ŝi nur rakontas alloge kaj ŝiaj fabeloj igas nin mediti pri problemoj, kiuj estas aktualaj kaj gravaj kaj por infanoj,

kaj por plenkreskuloj.

La verkistino mencias la internacian lingvon Esperanton, kiun parolas ĉiuj homoj. En la fabelo "La glacia planedo" oni kreos novajn kutimojn kaj la sola religio estos Amo. Sur la planedo "Frateco" oni ne scias kion signifas la vorto "malamiko" kaj sur la planedo Florokrono estas kosma leĝo "La motoro estas Amo".

La libro impresas per la bildaj priskriboj.

"Estis nokto. La ĉielo kaj la maro kunfandiĝis en profundan malhelbluan infiniton. Poste aperis luliloj. Ili estis faritaj el radioj kaj brilis kiel oro".

En la fabelo "Konversacio kun la Luno." Elena Popova poezie humure priskribas la Lunon:

"Kiam ĝi estas maldika, ĝi aspektas kiel kolerulo, kiu premas siajn lipojn, aŭ malŝatanto, kies okuloj estas malhelaj kaj li volas vidi nenion."

Estas plezuro legi tiun ĉi libron, ĉar ĝi gvidas nin al la mondo, kiun ni delonge forgesis. La mondo, kiu ravis nin, kiam ni estis infanoj kaj "La leteroj el la Kosmo" donas al ni la bonegan eblecon reveni en tiun ĉi mirindan mondon.



Georgi MIHALKOV



Ŝercoj

BONA KIALO

Kruko daŭre provas amindumi kun la bela, juna Jasmino... sed sensukcese.

Jasmino: Sed Kruko, mi ne povas rendevui kun vi, ĉar mi vidas nenian eblan estontecon por ni. Aŭ, ĉar mi devas pli atenti pri mia kariero. Aŭ, ĉar mi devas okupiĝi pri mia malsana praavino.

Kruko: Atendu, tio estas tri malsamaj kialoj por rifuzi al mi.

Jasmino: Jes, mi scias. Mi ne povis decidi kiun kialon mi preferas, do vi povas mem elekti!

SINJORO DE LA DOMO

Eta Joĉjo eniras la sidoĉambron, kaj vidas ke lia patro manĝas ion. Li proksimiĝas.

Joĉjo: Kion vi manĝas, paĉjo? Ĉu glaciaĵon rekte el la skatolo!?

Kruko: Jes ja!

Joĉjo: He ja! Mi ne sciis ke panjo permesas tion al vi!

Kruko, per laŭta voĉo: He, panjo havas nenion dirindan pri tio! Ja mi ja estas la mastro ĉi tie, la Sinjoro de la Domo.

Tiam per mallaŭta voĉo: Sed nur nenion diru al panjo pri tio...

AL KIU VI PAROLAS?

Avino Krukegino kritikadas sian filon: Kruko, vi devus fari pli da domtaskoj por helpi vian edzinon. Kaj vi devus ankaŭ esti pli bona rolmodelo al via filo...

Kruko interrompas ŝin: Panjo, ĉu vi konscias ke vi paroladas nur al vi mem?

Avino Krukegino: Kion vi celas? Mi ja paroladas al vi de dek minutoj!

Kruko: Vi ja paroladas, sed mi ne aŭskultadas. Kaj estas neniu alia en la ĉambro. Do, vi evidente paroladas nur al vi mem!

AL KIU VI PAROLAS?

Avino Krukegino kritikadas sian filon: Kruko, vi devus fari pli da domtaskoj por helpi vian edzinon. Kaj vi devus ankaŭ esti pli bona rolmodelo al via filo...

Kruko interrompas ŝin: Panjo, ĉu vi konscias ke vi paroladas nur al vi mem?

Avino Krukegino: Kion vi celas? Mi ja paroladas al vi de dek minutoj!

Kruko: Vi ja paroladas, sed mi ne aŭskultadas. Kaj estas neniu alia en la ĉambro. Do, vi evidente paroladas nur al vi mem!

tradukis **Rikardo Cash** el Francio publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anekdotoj@googlegroups.com



Kripta Krucvortenigmo



Reconstruu krucvortenigmon anstataŭigante ĉiun numeron per litero.

Fonto: Semajno de Enigmoj #7

[http://](http://www.semajnodeenigmoj.com)

www.semajnodeenigmoj.com

(La solvo troviĝas en paĝo 30)

1	2	3	B	4	5	6		7	D	4	7	8	1	
6	9	2	10	6			11	12	13	12	10	2		
9	6	11	V	4		3	2	13	3	6			14	F
15	13	12		14	8	13	12	6		2	8			
5	6			1	K	4	13	12	16		2	9	12	
12		14	12	13	10	6		6	13	2	10			
1	6	13	8	12	6		12	1	6	10	6			
2	17	H	12	5	L	6		4	13	2	10	6	10	

2. Klerigado de Glano

Jam sekvonttage Korako, trovinte de infanoj forĵetitan kinejan bileton, faldis ĝin, formigis kajeron kaj portis al Glano. Pasero donacis al li dum ia interbato elŝiritan el flugilo plumeton, kaj Sturĉjo plukis kelkajn berojn de viburno kaj elsukigis iom da bonega ruĝa inko. Heliko pruntedonis konketon por verŝi la inkon.

Hirundo modlis el argilo firman seĝon kaj tablon, kaj Kolombo plektis el branĉetoj subtegmentejon.

Ĉio finite, Glano kuspis la manikojn kaj profundiĝis en kleriĝadon.

Dum la unua leciono Korako instruis lin legi kaj skribi. Komence Glano sukcesis tute bone. Kvankam li makulis sin per la ruĝa inko ĝis la oreloj, kun grandegaj penoj li skribaĉis kelkajn kriplajn strekojn. La instruisto diris al li, ke tiuj estis literoj I. Glano ne kontraŭdiris. La instruisto ankaŭ eksplikis al li, ke disde ĉi tago kringoj ne plu estos kringoj, sed literoj O.

Aŭdinte tion, Glano ege malĝojis kaj plorkriis:

- Kaj kion mi nun manĝos?

Korako trankviligis lin, fiksas hejmtaskon kaj anoncis interrompon.

Dum la leciono pri kalkulado Kolombo pruvis al glano, ke streko kaj ringo signifas nek literon I, nek literon O, sed ciferon 10. Se vi alskribus al ĝi ankoraŭ unu ringeton, vi havus tutan centon.


Dum la tria leciono Hirundo instruis Glanon pentri kaj modli. Dum la lernanto ŝvitiĝinta knedis argilon, li havis sufiĉe da tempo ekspliki, ke kuniginte du rondetojn per kurba streketo, vi ricevos nek dek, nek cent, sed la okulvitrojn de la maljuna Korako -



Tamen fratoj Sturno, Sturĉjo kaj Sturneto, kiuj instruis Glanon pri versado, kantado kaj muziko, malkonsentis kun ĉiuj instruistoj kaj persiste asertis, ke algluinte al tiuj rondetoj po streketon dekstre aŭ maldekstre, ni havos ordinarajn notojn -



Plenumante la hejmtaskojn li konfuziĝis kaj intermiksas kie kaj kiam oni devas aligi streketojn al la rondetoj. Li Longe turnis sian duran kapeton, li ronĝis duonon de la pasera plumeto, turmentante sin, ĝis li trovis la solvon. Li zorgeme pentris grandan kringon kaj aldonis ĉe ĝi tiom da streketoj, kiom ĉiuj instruistoj devigis lin skribi. Finite la laboron li eĉ saltis pro ĝojo: kia belega suno iĝis -



Morgaŭmatene Korako nur ĵetrigardis al lia kajero, tuj koleriĝis kaj grakis:

- Iru kaj staru en angulo!

Kolombo eĉ rigardi ne volis, nur kuradis antaŭen kaj malantaŭen sur la branĉo minacante per duo* (*malbona poento en kvingrada taksadsistemo - noto de la tradukinto):

- Nur du, nur du, nur du!..

Tri fratoj muzikistoj kaŭriĝinte fajfadis:

- Kvi, kvi, kvi, kvivit! - kaj tirante la flugilojn, diskutis, kio estas estontece farenda kun tia malkapabla lernanto.

Nur sola Hirundo komprenis penojn de Glano kaj skribis al li kvinon por belege pentrita suno.

Tri tagojn Glano laŭdis sin al ĉiuj pri tiu poento, kaj la patro ameme ŝancelis lin kaj susuris:

- Ĉĉĉarme, tre ĉĉarme...

Plej multe Glano ŝatis la fizkulturajn lecionojn de Pasero. Dum ili li ne devis nek legi, nek skribi. Ĉiufoje Pasero alkondukadis kun si iun-ajn el siaj filoj, starigadis ilin unu kontraŭ la alia kaj ordonadis interbatiĝi.

- Ĉi ĉi ĉi-tien - saltadis li ĉirkaŭe, montrante, kien frapi. - Ĉirpu plu, ŝveliĝu plu. Batu, batu! Jen ĉi-tien, ĉi ĉi-tien!

Kiam ambaŭ lernantoj tute malfortiĝadis, Pasero rigardadis al la suno kvazaŭ al sia horloĝo kaj finadis la lecionon:

- Fino, viroj, kvivit, kvivite,

Nun ni lavos sin subite!

Poste ĉiuj tri hardadis siajn muskolojn en la lageto kaj dorlotiĝadis en arda borda sablo.

Tamen lernado ĉiutage pli kaj pli malfaciliĝis. Pro sia pigremo Glano kolektis aron da duoj eĉ pri modlado

kaj pentrado. Se ne pro fizkulturo, li estus fariĝinta absoluta duoricevanto. Nur sola Pasero dece kompatis la mizeran lernanton kaj pro la interbatado kelkiam skribetis al li trion. Tempo pasis kaj la instruistoj ekparolis pri ekzamenoj. Glanon timigis ekzamenoj kaj li decidis fuĝi. Li verŝajne estus fuĝinta, se ne unu okazintaĵo.

Post unu varmega tago Kverko kaj liaj loĝantoj estis atakitaj de kolerulo Tempesto. La reĝo de la arbaro nur ridetis kaj streĉiginte la branĉojn sen grandaj penoj kontraŭstaris ĉiujn atakojn de ventoj.

Tamen Tempesto ne kvietiĝis. Li decidis ruinigi ĉi arbon de kantemuloj, do li invitis la ventegojn de la tuta mondo por subteni la ventojn, kunvokis la plej nigrajn nubojn, peziĝintajn pro la glacia hajlo kaj reatakis Kverkon, ŝiradis liajn foliojn, rompadis branĉojn, tamen la miljara fortulo staris obstine, ĉar li firme konis, ke kun lia perejo, pereos ankaŭ ĉiuj liaj loĝantoj.

Jam Korako apenaŭ tenis sin sur la pinto de la arbo per flugiloj kovrinte siajn idojn, jam Pasero pro timo ne kapablis elparoli eĉ unu vorton, jam Kolombo kalkuladis la lastajn minutojn de sia vivo, nur sola Glano, ekvidinte, kiel vento dispecigis lian subtegmentejon kun la tablo kaj seĝo, ekĝojegis, ĉar opiniis, ke post la ruinigo de la lernejo li ne plu devos lerni. Sidante en profunda breĉo, li ekscitadis la ventegojn kaj ĵetadis per duoj buntigitajn kajerfoliojn al ili, kaj tiuj, nigriĝintaj pro kolero, peladis ilin tra la tuta ŝtorme bruanta ĉielspaco.

- Kaj nun kaptu Korakon! – kriegis al ili Glano.

Apenaŭ li ekkriis, la arbo estis frapita per blindiga fulmo. Ĝi kapturnigis Kverkon kaj ventoj komunpene kaptis la fortulon je la trunksubo kaj ekrenversis lin flanken. Ekkrakis la branĉoj de la fortulo, ekknaris la trunko kaj morte timiĝinta Glano elbreĉigis sian nazon por esplori, kio estas okazanta. Subite vortico de ventegoj kaptis, turnis lin kaj ĵetis en densan nigran nubon.

- Paĉjo, savu min! – ankoraŭ sukcesis ekkrii la petolulo.

Ekaŭdinte la filan kriegon, Kverko el ĉiuj siaj potencoj rigarde serĉis Glanon. Tiutempe elĉerpiĝis la tuta forteco de la ventoj.

Kiam Tempesto silentiĝis, Korako renovigis la kurbiĝintan neston kaj laŭ la peto de la reĝo de la arbaro, ekflugis por serĉi la pereintan petolulon. Nur dum la tria tago li trovis lin, ĵetitan en molan muskan kuŝejon kaj kovritan per diversaj branĉetoj kaj folioj.

Tutvoje reen Glano ploris kaj tremis, pensante ke li estos dece punbatita pro disŝirado de sia kajero kaj por la helpo al Tempesto ruinigi la subtegmentejon. Sed Kverko ne insultis lin, li ĝojis ĝisatendinte sian fileton, nomis lin bravulo kaj petis, ke Sturĉjo honore al

li kreu agrablan kanteton.

- Ĉu tio ne estos tro frua? – dubis la poeto.

- Nenimaniere. Ĉiuj konu, el kia argilo ni estas modlitaj! – fieris la patro, neglektante la filan ĉeeston.

Tri tagojn kaj tri noktojn Sturĉjo pensis, vokinte sian edzinon kaj fratojn por helpi, ĝis kiam li verkis jenan kanton:

*Mi ne kreis grandajn verkojn,
Estas mi ja eta Glano.
Morgaŭ estos mi jam Kverko,
Plej potenca Arbarano.*

Por surskribi ĉi kanton Korako faris kelkajn kajerojn. Sturno kreis muzikon. Hirundo modlis novan tablon kaj molan oportunan seĝon kaj feliĉa Kolombo post sufiĉe longa prikalkulado konstruis trioble pli grandan kaj trioble pli firman subtegmentejon. Nome en ĉi loko ĉiuj loĝantoj de la arbo por la unua fojo plenumis al Glano dediĉitan kanton. Nur Heliko, post kiam ĉiuj jam estis disiĝintaj, ankoraŭ rapidis al la solenaĵo, tirante surdorse malnovan, de sia avo donacitan konkan inkujon.

Tiel pereis la lastaj revoj de Glano fuĝi el hejmo sufiĉe antaŭe la ekzamenoj. Tamen post siaj aventuroj li komencis eĉ pli fiere sin teni. Ŝajnis al li, ke li estas ĉirkaŭata nur per malkuraĝuloj kaj malkleruloj. Li ne hontiĝis eĉ la patron surkrii:

- Ĉit, maljunulo! Staras vi dum jarcentoj en unu loko kaj nenion komprenas.

Kaj ne nur kun sia patro, sed ankaŭ kun siaj instruistoj li kondutis malĝentile.

- Provu nun via patro perrr bastono, perrrr bastono! – fanfaronis li antaŭ la kolombidoj.

- Eĉ Korako por mi estas nenio, - babilaĉis la fanfaronulo kun la paseridoj.

- Nu, vi nur pensu. Iaj ekzamenoj. Ferminte miajn okulojn mi trapasos ilin, - fieris li antaŭ hirundidoj.

Tamen dum la ekzamentago tuta braveco de Glano forvaporigis. Li ree decidis kaŝi sin. Sed li ne sukcesis. Apenaŭ li elŝovis sian kapon el sia breĉo, tuj lin ĉirkaŭis aro de scivolemuloj.

- Glano montros, kion li kapablas, - parolis unuj.

- Mi vetas ke unu instruisto devos skribi al li seson! – kriis aliaj.

Nepovante liberiĝi de ili, Glano plonĝis rekte en la lageton kaj provis kaŝi sin malantaŭ la kalamoj.

- Tiu viro estas aso, - kriis alfluginta Pasero, - finos tuj unuan klason!

Glano naĝis al la bordo kaj kliniĝinte kapon revenis al Kverko.

- Ĉio finita, - diris li sidiĝinte ĉe la ekzamena tablo kaj sentis, ke lia koreto pro timo ekbatis ie en la

kalkano de la maldekstra piedo. Iel kontrolinte sin, li inkumis sian plumon kaj pretiĝis por skribi la diktaĵon.

- Grak, grak... La korakoj estas bravaj, kvazaŭ drakoj – diktis Korako.

Glano kun streĉitaj oreloj aŭskultis korakan voĉon, laboregis, skribis, sed dum la tuta leciono li skribis nur la solan unuan vorton. Korako rigardis al li tra okulvitro supra kaj demandis:

- Kial nur – grak?

- Tial, tial, ke la korakoj jam forflugis, - respondis Glano.

- Korekte! – kriis kolektiĝintaj malkleruloj. – Korekte, skribu al li seson!

Sed Korako estis nerompebla. Nur pro la kompato al la patro, li skribis al Glano grandegan trion kun eĉ pli granda vosto. Dum la leciono pri kalkulado Kolombo alportis du ŝtonetojn kaj metis ilin aparte. Poste li puŝis ilin kune kaj demandis:

- Kiom estos?

Glano fleksadis siajn fingrojn, skrapis sian kapon, ronĝis la plumon ĝis kiam li pripensis:

- Ĉi tie unu kaj ĉi tie unu!

Kolombo ŝveliĝis kaj nekontente ekpaŝadis sur la branĉo antaŭen kaj malantaŭen.

- Estos du, estos du, - minacis li al la lernanto.

- Estos du, - ripetis ektimiĝinta Glano.

Kolombo kontente kapjesis kaj aldonis al la du ŝtonetojn trian. Post ioma pensado li apartigis unu.

- Estos du, - imitis la instruiston Glano.

Kolombo eĉ kaŭriĝis pro surpriziĝo. Poste li

subtrahis du el kvar, tri el kvin, kvar el ses, kaj eĉ ok el dek, sed Glano ĉiam senerare respondadis :

- Estos du.

Kunvenintaj amikoj de Glano kaj diversaj scivolemuloj eĉ ĝoje kriis pro plezuro.

- Skribu ses!- kriegis ili al Kolombo.

- Kaŭriĝinte mi skribas, kaŭriĝinte mi skribas... Jen! - rukulis Kolombo, tamen skribis li kvaron.

Nur la muzikisto Sturĉjo plej bone komprenis la dezirojn de la scivolemuloj kaj permesis al Glano elekti ian ajn kanteton laŭ sia volo kaj kanti ĝin por ĉiuj.

- Mi plej ŝatas tiun, kiun vi kreis pri mi, - respondis Glano al ili.

Sturĉjo estis tiom emociigita per tia diligenteo de la lernanto, ke li nekontroliĝinte sin, ekkantis la kanteton de sia propra kreado. Ĉiuj kunkantis. Ekzamenoj pri pentrado kaj modlado forestis en la tabelo, do Korako, kun ĉirkaŭe sonanta kanto, enmanigis al Glano ateston pri la ellerno de la kurso de la unua klaso.

Disde tiu tago Glano tiom ŝveliĝis, ke li ne plu kapablis komunikadi eĉ kun si mem.

(daŭrigota)

"La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj" estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.

Lasta Deziro



Homoj aĝaj (kaj ne nur) fojfoje pensas pri sia forpaso. La pandemio plioftigis tiajn pensojn. Eĉ se ni volas ne pensi pri la morto, la angoro kaŝiĝas ie, en la subkonscio. Certe, ni deziras vivi, kaj se eble, ne morti en hospitalo, ne esti metitaj en nigran sakegon...

verkis kaj sendis Lenke Szász el Rumanio

Miaj geavoj, gepatroj forpasis en siaj hejmoj, kaj gefiloj staris apud ili.

La mondo ŝanĝiĝis. Sed revadi eblas.

Mi imagas por mi romantikan finon, sen grandaj suferoj, kun filo aŭ filino proksime. Antaŭ la lastaj minutoj, mi estus enpense en la patrujo de mia koro – en Grekio. Sub la bluega greka ĉielo, sur la greka marbordo. De ie aŭdiĝus (eble el You Tube) mia ŝatata melodio, „La Paloma”, kantata de la juna Nana Mouskhuri (En Interreto ŝi troveblas.) Sur la flugiloj de tiu rava melodio mia animo transflugus al la alia mondo, kun plezurego. Tiu melodio ĉiam vekis en mi vivĝojon.

Kaj mi eble eĉ ne mortos...

verkis kaj sendis **Lenke Szász** el Rumanio



La poeto, **KOUNO Susumu** (1904-1990) finis la kursojn en Kobe centrala seminario. Pastro en Preĝejo de Tamasima (Okajama). Proponinte la komplimentan propagandadon de KAGAŬA Toyohiko (fama kristana propagandano) en Okajama Hansen-malsanejo, li energie laboris dum kvindek jaroj kaj kelkaj en la loko. Li recevis la premion "St. Rjokan literaturo" laŭ la glorplena merito de la laborado kun Patrino Teresa.



Viŝtuko

Kiam oni estas embarasata, tio estas rememorata.
Kiam oni finas uzi ĝin, tio estas tuj forgesita.
Mi volas fari al viŝtuko, kiu mallarĝiĝas en la angulo de kuirejo,
ne ŝcias kiel venĝi, kaj gaje servas matenon kaj nokton.

Misio

Ne povas viŝi vizaĝon kun la karbonigra viŝtuko.
Ne povas viŝi piedon kun la neĝoblanka mantuko.
Nur la utiligeblo estas diferenca,
kaj la diferenco ne estas en la misiaestimeco.
Ne fieru, mantuko! Ne antaŭjuĝu, viŝtuko!

Esti senpacienca

En strato, aŭto estas senpacienca nur en transpaso.
En kamparo, oni estas senpacienca nur en altrikolto.
En kompanio, oni estas senpacienca nur en oferto.
Laboranto estas senpacienca nur en altsalajro.
Gepatroj estas senpacienca nur en tio,
ke iliaj knaboj sukcesus eniri en gloraj lernejoj.
Popolo estas senpacienca nur en la stabileco de familia vivo.
Grandaj regnoj estas senpacienca nur en la ekspansio de armadoj.
Jam la mondo estas ŝanĝanta al la senanima dezerto.

Estis bone al mi

Estis bone al mi, ke hejmo estis malriĉa.
Estis bone al mi, ke hejmo estis en kamparo.
Estis bone al mi, ke mia patrino estis malsana.
Estis bone, ke mi indulgis ŝin.
Estis bone al mi, ke ŝi estis ĝoja.

Estis bone al mi, ke mi ne povis fariĝi kuracisto pro kolorblindeco.
Estis bone al mi, ke mi fariĝis pastro.
Ĉio estis bone al mi.



Dankinde kaj maltrankvile

Estas maltrankvile, ke ni estas servita de unu persono.
Estas pli maltrankvile, ke ni estas servita de dek aŭ cent personoj.
Estas pli kaj pli maltrankvile,
ke ni estas servita de mil aŭ dek mil personoj.
Fine la vivo estas maltrankvila.
Estas dankinde, ke ni servas al unu persono.
Estas dankinde, ke ni servas al dek aŭ cent personoj.
Estas pli dankinde, ke ni servas al mil aŭ dek mil personoj.
Fine la vivo estas dankinda.

Ne estis sensignifo

Se ne estus la nekuracebla malsano en mia patrino, mia vivmaniero estus tute alia.
Kiam mi rezignis fariĝi kuracisto,
fermis la vojo al pastro pro kolorblindeco.
Tial mi estas tutan vivon kunligita kun malsanuloj.
Ne nur kun japanoj, sed kun alilandanoj
mi daŭre preĝi kaj havas kontakton.
Ne estis sensignifo en la gvido kaj konduko de Ĉiela Patro.

Pretervole ellasitaj vortoj

Pretervole ellasitaj vortoj donas ĝojegon.
Senintence ellasitaj vortoj donas profundan malĝojon.
Senintence ellasitaj vortoj donas nekuraciĝeblan vundon.
Pretervole ellasitaj vortoj donas anĝelan konsolon.
Pretervole ellasitaj vortoj ŝanĝas al espera suno.
Bonvolu memori la gravitecon de unu vorto.
Bonvolu servi al nur unu vorto!
Dio, bonvolu servi al nur unu vorto!

tradukis kaj sendis **Kacu Matoba** el Japanio

Nun pri tio multaj parolas, disvastiĝis diversaj onidiroj, tiu diras tiel, alia – aliel, tria-refoje aliel, tamen verdire nenio simila okazis, kaj tio, pri kio parolas homoj-simple estas babilaĵo, ĉar ĉio okazis tute alie. Kiel hodiaŭ mi memoras. Estis tiam pluvoza aŭtuna posttagmezo. Nun, post tiom da tempo, tio ĉi elvokas al mi nuran rideton. Sed tiam, kiam kortuŝita nia samideanino Marija, tute tremanta, telefonis al mi, mi konfesas, estis mi koleriĝinta serioze. Verdire, kiaj estas ankoraŭ strangaj kaj infanecaj homoj, eĉ inter la esperantistoj.

Unu aŭtunan posttagmezon eksonis en mia loĝejo la telefono.

– Halol! - sinaŭdigis mi.

– Laj Mondo, helpu min, - en granda ekscitiĝo parolis Marija, esperantistino de nia urba klubo.

– Kio okazis? - ekinteresiĝis mi.

– Staseo ne plu parolas, - plorante lamentis Marija.

Staseo estas edzo de Marija kaj ili estas aktivuloj en nia urba esperantista klubo. Tial la afero iĝis interesa al mi, - prezidanto de la klubo.

– Ĉu antaŭlonge eksilentis li? - scivolis mi.

– Jam tutan semajnon li silentas.

– Ĉu insulto?

– Ne! Nokte li iradas, manĝas...

– Kion li diris antaŭ ol eksilenti? - daŭrigis demandadon mi

– Li diris, ke li volas eldrinki...

– Sed, tamen li ne drinkas! - ekmiris mi. - Li abstinis!

– Mi ankaŭ diris al li tion saman! - aldonis Marija.

– Kaj li, kion?

– Li diris, ke ankaŭ ŝtatprezidento drinkas...

– Kaj vi, kion?

– Mi diris, ke tiu estas prezidento, sed ne li.

– Kaj li, kion?

– Li diris, „kaj tamen-ĉu mi estas hundo?“. Kaj eksilentis ekde tiu tago... - finis Marija.

Mi volis diri al Marija, ke ŝi faris taktikan eraron – ne dezirante, pervorte humiligis sian edzon. Sed mi sindetenis, por ke ankaŭ ŝi ne eksilentu. Mi nur eldiris:

– „Atendu, mi tuj venos al vi.“

La familio de Marija kaj Staseo loĝis sur najbara strato, en bela, brika loĝdomo, ĉirkaŭita de impona ĝardeno. Mi perdis ne pli ol dudek minutojn ĝis veni al ilia loĝdomo. Enirinte mi tuj diris al Marija:

– Sekve li, eventuale, estas hundo...

– Kiu? - ekdemandis tremante Marija.

– Staseo, kompreneble.

– Mi mortos! - Marija prenis sin je koro.

– Ne timu...! Staseo tiel nur imagas sin... Psikologia krizo. Interese, kie estas komenco de komenco?

Marija forturnis la okulojn. Mi eniris la ĉambron de Staseo. Li kuŝis sola sur familia lito. La manoj sur la bruston metitaj. La vizaĝo ruĝetis. Lipoj forte kunpremitaj, okuloj fermitaj. Grimaco rigoris. Mi sciis, li koleris kontraŭ tuta mondo, ankaŭ kontraŭ si mem.

„De kio komenci?“ Mi ekrigardis min ... aha, vatjako-ĉiutaga vestaĵo. En ĝi estas interna poŝo, en kiu mi kaŝas platan boteleton kun „medikamento“. Mi ŝovis manon en sekretan poŝon, eltiris de tie boteleton kun litova brando, forprenis ŝtopilon kaj, kliniĝinte, premis boteleton al lipoj de Staseo. Sorbdrinkas li. Duonon de la boteleto havo li eldrinkis! Kaj fine li ekparolis:

– Efektiviga, ke inter tiuj mensaj malsanuloj estas homoj komprenantaj, - komencis Staseo ne malfermante okulojn. Mensa malsanulo – tiel nomas min mia propra virino. Mi ekridegis - kaj pretigis min al profesia atako.

– Li vere ne malsaĝas... Mi volas ekvidi..., -kaj Staseo malfermis okulojn.

– Hej! ĉi tie estas mi, Laj Mondo. Ĉu vi memoras, kio vi estas?

– Mi estas homo, vera homo... , - firme respondis Staseo.

Dank'al Dio, Staseo ne estas hundo - do mia antaŭvidita diagnozo ne konfirmiĝis!

– Staseo, kiam vi tenas enmane citronon, ĉu vi scias, kion necesas fari? - daŭrigis mi esploron .

– Mi ne scias kaj scii ne volas... - respondis Staseo. - Neniu donas al mi citronon... Mi trinkas nur malvarman akvon... Ĉiuj atendas mian morton, kaj la plej atendas Marija... mi scias, kion mi parolas...

– Staseo, - mi antaŭ liaj okuloj eksvingis boteleton, - ĉu vi povas malkovri al mi ĝuste komencon de komenco?

– Tio estas, malkovri la kaŭzon, pro kiu mi eksilentis? –S taseo formulis demandon kiel akademiano.

– Ĝuste tiel! - restis kontenta mi.

– Mi estas esperantisto kaj mi bezonas renkontiĝi kun samideanoj por konversacii, babili, aktivi ktp ktp, do vi scias... ĉu ne? Kaj jen... tiu viruso, tiu pandemio malbenita... oni ne forlasu hejmon, oni singardu... epidemio de kronviroza malsano plilongiĝis kontraŭ ĉiuj atendoj... Kaj mi ekdeziris eldrinki, por ĉion forgesi, malstreĉiĝi...

– Do pro kio vi ne eldrinkis? - interrompis lian >>18



Adem Demaçi ¹
2001



Miaj prizonoj- mia granda ŝanco!

Ĉiuj, sciantaj kio ja estas la prizono, des pli ĉiuj tiuj, kiuj pasigis parton de sia vivo en prizonoj, certe surpriziĝos pro la titolo de ĉi tiu skribaĵo.

Tamen, ĝuste dank'al mia longtempa restado en la sovaĝaj prizonoj, mi sukcesis kapabliĝi por pli bone kompreni la vivon en ties tuta komplekseco. Dank'al al mia longtempa enprizona restado mi sukcesis kompreni, ke la vivo, la tuta vivo, konsistas el sennombraj paradoksoj, grandaj kaj etaj. Kaj plue mi sukcesis kompreni la plej grandajn kaj plej severajn paradoksojn de la vivo, mi ankaŭ sukcesis adaptiĝi kaj akcepti ĉi tiujn paradoksojn kiel ion tute normalan kaj eĉ necesan, por ke saviĝu la senco de la vivo mem.

Imagu, kio okazus en nia vivo aŭ kio restus el nia vivo se ni, konforme al nia deziro kaj limigita scio, eliminus ĉiujn tiujn kozojn kaj fenomenojn, kiuj ne plaĉas en nia vivo.

Se ni eliminus la mallumon, ni samtempe eliminus ankaŭ la lumon, se ni eliminus la malbonon, ni samtempe eliminus ankaŭ la bonon, se ni eliminus la malliberon samtempe mi eliminus ankaŭ la liberon, se ni eliminus la morton, ni samtempe eliminus ankaŭ la vivon mem! Tial, kiu komprenas ke la paradoksoj estas konsistiga parto, ne disigibla de la vivo, tiu komprenas ke oni neniel devas tuŝi ilin. Al tiu, kiu adaptiĝas al la paradoksoj, estas pli facile ankaŭ ami la paradoksojn, tiel kiel li amas la vivon mem.

Oni havas impreson, ke kvazaŭ ni foriĝis disde nia temo sed ne, ni estas ĝuste ĉe la koro de nia temo. La prizonoj estas, por la limigitaj mensoj, simboloj de la mallibero, malvivo, suferadoj, senespero kaj malriĉeco. Mi trovis en miaj prizonoj mian veran liberon, mi trovis la sencon de mia vivo, mi trovis mian plezuron, mi trovis mian feliĉon kaj mi trovis la tutan mondan

riĉecon!

La unuan nokton de la prizono, la 19-an de novembro 1958, mi troviĝis en la plej granda dilemo de mia vivo, mi estis en la plej drameca momento de mia vivo. Ĉu mi savu mian korpon, oferante mian animon, aŭ ĉu mi savu mian animon, oferante mian korpon. Ĉu mi restu je la flanko de la libero, savante mian korpon provizoran, aŭ ĉu mi oferu mian korpon provizoran, por ke mi akiru la liberon de la eterna animo? La dilemo konsistis en tio, ĉu mi "savu" mian memamon por mi mem kaj perdu la ceterulojn, aŭ mi oferiĝu por la ceteruloj kaj akiru ĉiujn?

Por ke "mi saviĝu", estis tute "facile". Mi akceptu antaŭ la inspektisto, ke mi estis erarinta, mi ĵuru ke neniam plu mi agos kontraŭ la ŝtato kaj, kiel atestaĵo por tio, mi fariĝu kunlaboranto de la Serba ŝtatsekureco.

"Se vi agos tiel", diris al mi la inspektisto Momĉilo Ĉanoviĉ, "tiam vi ekhavos monon, tiom kiom vi volos kaj fariĝos fama verkisto, vi atingos tre supren kaj ni liberigos vin ekde morgaŭ matene.

Sed dank'al la saniga mamnutro de mia patrino Nazife kaj ties honesta eduko, mi havis tiom da fortoj por kapmovi je neiga signo.

"Cu vi ne volas?! Ĉu vi rifuzas nian bonecon?"- Ululis Ĉanoviĉ. "Tiukaze vi vidos ja kiuj ni estas!"

"Ankaŭ vi ja vidos kiu mi estas" Mi pensis en mi mem, ne kuraĝante aldiri tion al Ĉanoviĉ. Sed tiu mia silenta penso estis ja mia plej majesta decido kaj plej benita en mia vivo. Mi tiel pasigis sukcese la ekzamenon antaŭ mi mem. La cetero alvenis spontane.

Ĵus ili ĵetis min enen kaj fermis la pordon per bolto de la ĉelo numero 8 de la prizono de Prishtina, kiu, el malvasta, malhela kaj malvarma kamero, turniĝis en la senfinan spacon, en kies mezo staris granda, giganda kandelo, kiu je ties pinto flambuliĝis. Tiu kandelo estis mi kaj la unua kozo, kiun mi rememoris, estis "La vortoj de la kandelo" de Naim ²:

*"Meze de vi mi staras kaj estas broganta,
Por ke mi donu al vi iom da lumo,
Por ke mi turnu nokton al tago..
Por ke mi brilu bone kaj vi vidu,
-Unu la alian rekonu.."*

Ju pli multe la kandelaĵo forbrulis, ĝi anstataŭ ol malpligrandiĝi, kontraŭe, kreskis kaj fariĝis pli granda, kaj ties lumo plu forpuŝis la mallumon! Ju pli granda fariĝis la kandelo, des pli foren eĥadis ĝia voĉo.



La decidemo por oferiĝi por la aliuloj estas la plej drameca disigo, disde memamo kaj la unua paŝo sur la nekonata kampo, sed ĉiam freŝa, ĉiam alloga, tro magieca de la libero.

La tutan unuan enprizonan restadon, de la 19-a de novembro 1958 al la 18-a de novembro 1961, mi travivis kiel kandelito. En la dua prizono, de la 8-a de junio 1964 ĝis la ok-a de junio 1974, aperis sur la senfina kampo de la libero ankaŭ aliaj kandelitoj. Ili ne nur brulis flamece, ne nur recitadis, sed ili ankaŭ kantis la kanzonon de Dedë Gjo Luli³

La tuta dua enprizona restado pasis kantante la kanzonon de Dedë Gjo Luli.

Dum mia tria enprizona restado de la 6-a de oktobro 1975 ĝis la 21-a de aprilo 1990, okazis multaj geedziĝfestoj en Dardanio⁴, multaj junedzinoj estis alvenintaj kaj multaj junedzinaj akompanantoj falis en Dardanio. Ĉifoje oni kantis la kanzonon "Respubliko, Konstitucio, ĉu perfavore, ĉu permilite!"

Post tio la kandelitoj komencis organiziĝi, la kandelitoj komencis marŝadi, la kandelitoj komencis agadi, ĝis kiam ili disigis la laĉon de la kolo de la dardanoj (Dardanët)⁵

La prizonoj estas lokoj, kie naskiĝas nemortebraj kandelitoj. Tie, kie la kandelitoj vivbrulas, tie naskiĝas ankaŭ la nemortebra libero.

tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

¹ **Adem Demaçi** naskiĝis la 26-an de februaro 1936 en Prishtina (Kosovo). Li baraktadis por la nacia afero de albanoj en la eksa Jugoslavio, kie albanaj etnuloj konsistigis la trian grandan popolon post serboj kaj

kroatoj. Li postulis egalecon de Regiono de Kosovo al la ceteraj respublikoj de Jugoslavio. Pro tia politika engaĝiĝo, oni enprizonigis lin entute pli ol 28 jarojn!. Liberiginte, aprile 1990, Adem Demaçi daŭrigis sian politikan agadon. Oni nomis lin Mandelo de Eŭropo. Komence li gvidis la Konsilion por la Homrajtoj laĵ Homaj Liberoj ĝis 1995.

Decembre 1991, la Eŭropa Parlamento honorigis lin per la Premio Saĥarov.

En la jaro 1994, li akiris la Premion de la Unuiĝintaj Universitatoj de Hispanio por la libera parolo kaj penso.

La Premion de la Universitato de Oslo (Norvegio) en 1995 por la libera parolo kaj penso

La Premion "Heroo de Kosovo" liverita de prezidanto de Kosovo, Jakup Krasniqi en la jaro 2011

La Premion "Honoro de Nacio" liverita de prezidento de Albanio Bamir Topi en 2012

Li estas same Honora Civitano de Tirana ekde la jaro 2015.

Dum la jaroj 1998-1999 li estis la politika proparolanto de la Naciliberiga Armeo de Kosovo (UÇK).

Dum 2005-2007 Demaçi estris la Ligon de Verkistoj de Kosovo.

Adem Demaçi aŭtoras pli ol 13 romanoj, centoj da artikoloj kaj intervjuoj.

Adem Demaçi mortis julie 2018 en Prishtina.

² **Naim Frashëri**, albana nacia poeto, 1846-1900

³ **Dedë Gjo Luli**, renoma albana kontraŭotomana batalanto

⁴ **Dardanio**, vasta regiono, kies parto estis la nuna teritorio de Kosovo, loĝata de iliroj, antaŭintoj de albanoj

⁵ **Dardanët**, Iliira gento de Dardanio.

5>>> kamiona petveturado. Ni povas pensi "sed, kial la aventuro finiĝis tiom rapide?". Tamen, kun nur 10 cendoj en sia poŝo, nia heroo eniras kafejon frumatene. Tie li renkontiĝas kun "La Knabino". La nomo de Veronica Lake en la skripto estas "La Knabino". Eble ĉar ŝi estas unu el la miloj da knabinoj, kiuj venis al Holivudo kaj malbonŝance seniluziiĝis. La knabino ordonas al Sullivan kafon. Ŝi ĉiam volis renkonti Ernst Lubitsch, sed nun ĉi tiu estas la tago, kiam ŝi forlasas la film-landon. Fakte, kvankam la vivdirekto de la knabino kaj nia heroo estas tute malsimilaj, sorto kunigas ilin. Sullivan por respondi al la favoro de la knabino provas malespere konvinki ŝin, ke li estas fama direktoro, sed poste kiam li kondukas ŝin al sia domo ŝi komprenas la veron. Post iom da tempo, la viro, kiu volas ekvojaĝi denove por atingi sian celon, kontraŭstaras al la propono de la knabino esti lia



kunvojaĝanto, sed ĉi tio ne daŭras longe. Ŝajne la petado de la knabino en la manuskripto estas iomete ne konvinkiga al mi, aŭ tio ŝajnis tiel al mi.



La dua vojaĝo okazas en trajno plena je fuĝantoj, en la supo-kuirejo por malriĉuloj kaj la ritoj ĉeestataj de malriĉuloj. Inter jukadoj, odoroj, bovlo da malbona manĝaĵo ktp. Ni povas vidi la amuzan situacion de nia direktoro eĉ pli bone en la okuloj kaj gestoj de la knabino. Sullivan suferas pro febro. Denove reveno. Je ĉi tiu punkto, la scenaro ŝajnas esti longdaŭra kaj iomete pliiĝanta. Sed fakte ne estas tiel! Jen la ĉefa doloriga procezo komenciĝas post tio. Denove, dum li entrainiĝas kontraŭleĝe, lin kaptas fervojinspektisto kaj kverelante li batas la inspektiston per ŝtono sur la kapo. La rezulto estas kortumo kaj malferma malliberejo kun katenoj ĉe la piedoj kaj sub la premo de iu viro, kiu, mi ne scias, ĉu li estas prizonestro aŭ ĉefpolicisto. Eĉ se li asertas esti filmdirektoro, li ne povas konvinki iun ajn.

Ĉiuokaze, mi ĉesos paroli pri la sinoptiko nun... Nia filmdirektoro farigas sin novaĵo en la ĵurnaloj kun lerta penso kaj tiel saviĝas de la malliberejo. Sed antaŭ tio, li komprenas, kion bezonas la homoj, precipe la malriĉuloj, en la sceno kie li spektas filmojn en la preĝejo kune kun aliaj malliberuloj katenitaj en la piedoj. Ili kundividas la saman sorton en tiu preĝeja sceno, kiu estas unu el la plej okulfrapaj scenoj de la

filmo. Kvankam ne tute laŭvorte, ĝi estas io kiel la "peripetio" (sortoturno, nedezirinda aventuro) en grekaj tragedioj. Ĉiuokaze, liaj vortoj en la lasta sceno montras, ke Sullivan komprenas la valoron de komedio kaj lia laboro.

Cetere, la nigra pastro kaj la tutnigra komunumo en ĉi tiu preĝeja sceno, antaŭ ol la malliberuloj alvenas, la sentemaj admonoj de la pastro, al la komunumo, ke ili faru nenion por humiliĝi la malliberulojn sugestas, ke povas esti nuancoj eĉ inter tiuj, kiuj estas subpremataj. La nigraj "aliaj" kaj la malliberaj "aliaj"... La komunumo ekkantas la negro-spiritan kanton "Iru Malsupren Moseo" sub la gvidado de la pastro, kiam la malliberuloj kun katenoj malrapide eniras, kaj eksidas en la unuaj tri vicoj rezervitaj por ili... Ĉi tio iomete rememorigis min la kaptitkoruson en la opero Nabucco.

Jes, mi parolis multe. Resume: Ĝi estas kaj usonstila komedio de la 40-aj jaroj kaj kritika aliro al la usona socio de tiu periodo, kvankam ĝi estas klasifikita kiel komedio aŭ satiro, kiu rakontas pri la dolorigaj temoj de la socio, la subprematoj, la senhejmuloj, la senlaboruloj ktp. Sed mi pensas, ke ĝi estas rakonto kun optimisma fino, ekvilibra kaj sen ĝena filmo. Male al multaj realismaj kaj socialismaj realismaj filmoj, ĝi ne igas nin suferi pro "amareco". Ĝi parte rememorigas la filmojn de Frank Capra. Plie en la filmo la direktoro filmos la libron de la fikcia verkisto (Sinclair Beckstein) "Ho frato, kie vi estas?". La nomo de la verkisto estas miksaĵo de la nomoj Upton Sinclair, Sinclair Lewis kaj John Steinbeck. Ĉi tiu ne vera romano menciita en la filmo fariĝos titolo por la filmo de fratoj Coen, kiun ili faris inspirita de Preston Sturges en la jaro 2000.

Vi ankaŭ mem povas vojaĝi internen de ĉi tiu filmo de la jaro 1941.

Konuralp Sunal

21 majo 2021

Büyükkada, İstanbulo, Turkio

Niaj E-kursoj kaj konferencoj en julio kaj aŭgusto

-- Greziljono

Ni petas vin aliĝi al niaj someroj staĝoj en Greziljono (Francujo), ni petas vin dissendi tiun mesaĝon al viaj amikoj

- * **2021-jul-05/09** 2-a Verda Naturisma Semajno kun INOE
- * **2021-jul-23/aŭg-02** 5-a Maratona Esperanto-kurso kun Koutny Ilona, Renée Triolle, Marc Giraud, FEI-ekzameno
- * **2021-jul-25/31** 33-a Internacia E-Konferenco post OSIEK pri variaj temoj
- * **2021-jul-26/29** 75-a AMO pri "Kulturo pere de Esperanto"

* **2021-aŭg-02/12** 11-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj kun Nicky, Jean-Luc, Larisa...

* **2021-aŭg-13/20** FESTetOvenas, mojosa junulara renkontiĝo kun elstara E-muzik-programo

Ĉiuj eventoj de Greziljono en nia agendo <https://gresillon.org/agendo>
Inscription en <https://gresillon.org/inscription>



La arbaro silentis. De tempo al tempo subite ekkantis birdo ĝoje kaj rave. Inter la arbokronoj enŝteliĝis sunradioj, kiuj orumis la foliojn kaj ili brilis kiel ormoneroj. La vento lulis la arbustojn, malantaŭ kiuj kvazaŭ scivoleme gvatus iu.

Dimo malrapide paŝis, ĝuante la silenton, la freŝan aeron, la profundan sennuban ĉielon. Li ŝatis la arbaron kaj ofte promenadis en ĝi. Nun li ekiris al vilaĝo Svila, kiu kaŝis sin en la montosino. Delonge Dimo ne estis tie. Malmultaj homoj loĝas en la montaraj vilaĝoj. Nerimarkeble la vilaĝoj senhomiĝas kaj iom post iom ili malaperas. Antaŭ jaroj tie estis belaj domoj, multaj vilaĝanoj, junaj kaj maljunaj kaj infanoj, kies gajaj krioj sonis el la lernejaj kortoj.

Dimo iris el la arbaro kaj sur pado, kiun li delonge bone konis, paŝis al la vilaĝo. De sur ne alta monteto li vidis la domojn, similajn al blanka ŝafaro. Dimo ekiris sur eta strato, kiu gvidis al la vilaĝa placo, sed subite li haltis. Unu el la domoj estis renovigita. Ruĝaj tegoloj kovris la tegmenton. La flavkoloraj muroj kvazaŭ brilis, la balkono, kiu iam minace pendis, nun estis remontita kaj farbita. Surprizita Dimo rigardis al la korto, kie staris skulptaĵoj, argilpotoj, amforoj. En tiu ĉi malproksima eta vilaĝo tio aspektis ege strange. Sendube iu aĉetis la iaman malnovan domon, renovigis ĝin kaj starigis en la korto belegajn skulptaĵojn. Kiu loĝas nun ĉi tie – demandis sin Dimo. Li proksimiĝis al la kortbarilo por pli bone vidi la skulptaĵojn. Al li paŝis viro, verŝajne la posedanto de la domo.

- Bonan tagon – salutis li Dimon.

La viro estis eble sepdekjara, alta, magra kun blanka kiel neĝo hararo, blanka barbo kaj kun okuloj bluaj kiel la ĉielo.

- Ĉu vi loĝas ĉi tie? – demandis Dimo.

- Jes. Antaŭ duonjaro mi aĉetis tiun ĉi domon kaj renovigis ĝin.

- Kaj en la korto vi faris belagan ekspozicion – rimarkis Dimo.

- Bonvolu eniri trarigardi ĝin – proponis la viro.

- Dankon.

Dimo eniris la vastan korton.

- Ĉu vi estas skulptisto? – demandis li.

- Jes. Mi loĝis en la ĉefurbo, sed mi decidis translokiĝi en tiu ĉi silenta kaj kvietaj vilaĝo. Do, bonan venon – ekridetis la skulptisto. - Mi invitas vin trinki glason da vino.

- Dankon.

- Mia nomo estas Vasil Ginev – diris li.

- Dimo Milev.

Ambaŭ sidis en la korto ĉe ligna tablo sub la vinberlaŭbo. La skulptisto portis kruĉon da vino,

glasojn, teleron da fromaĝo. Li plenigis la glasojn, levis sian glason kaj diris:

- Je via sano. Mi ĝojas konatiĝi kun vi. Malmultaj homoj venas ĉi tien, en Svila.

- Je via sano. Kiel vi iĝis skulptisto? – demandis Dimo.

- Mi tute ne supozis, ke iam mi estos skulptisto – komencis rakonti Vasil. – Mi naskiĝis en eta urbo. Miaj gepatroj estis ordinaraj homo, paĉjo – laboristo, panjo – poŝtistino. Mi havas pli aĝan fraton. Dum la infaneco mi estis ege petolema, malobeema, malbone mi lernis kaj ofte mi forestis el la lernejo. Mia frato tamen estis bona knabo. Li belege kantis. Foje estis koncerto en la lernejo. Paĉjo, panjo kaj mi iris al la koncerto. La salono plen-plenis. Kiam mia frato ekstaris sur la scenejo kaj ekkantis, estiĝis profunda silento. Mirinde li kantis. Li finis kaj eksplodis aplaŭdoj. La publiko estis ravita. En okuloj de panjo mi vidis larmojn de ĝojo, fiero kaj feliĉo. En tiu ĉi momento mi ekdeziris fari ion, kiu igos panjon ekplori pro ĝojo. Mi deziris ĝojigi panjon tiel, kiel mia frato ĝojigis ŝin.

En la lernejo allogis min la pentrado kaj mi komencis diligente pentri. La instruisto stimulis min.

Mi finis Belartan Akademion, sed antaŭ mia unua ekspozicio, panjo forpasis. Mi ne vidis la ĝojon en ŝiaj okuloj. Tamen mi decidis: ĉion, kiun mi kreos, mi dediĉos al panjo. Poste plurfoje mi vidis la ĝojon de la homoj, kiuj rigardas miajn skulptaĵojn kaj hodiaŭ mi vidis la saman ĝojon en viaj okuloj.

La skulptisto eksilentis. Liaj helbluaj okuloj rigardis la verdajn montetojn. La tago estis suna. Sur la fono de la montaro staris la belaj skulptaĵoj.

verkis kaj sendis **Julian Modest**
Sofio, la 2-an de majo 2021



Solve de la krucvort-enigmo

KRIPTA KRUCVORTENIGMO

K	A	B	U	L	O		D	U	D	E	K
O	M	A	N	O		V	I	R	I	N	A
M	O	V	U		B	A	R	B	O		F
P	R	I		F	E	R	I	O		A	E
L	O		K	U	R	I	S		A	M	I
I		F	I	R	N	O		O	R	A	N
K	O	R	E	I	O		I	K	O	N	O
A	Ĥ	I	L	O		U	R	A	N	O	N

Mi longe vojaĝis,
veturis kaj naĝis,
mi longe vin serĉis
ĝis nun,
tra dudek montaroj
kaj multe da maroj,
sub vento kaj suno
kaj lun'.

Revante pri via
talio gracia,
banata de l'suna leviĝ',
pri via rigardo,
brilanta kun ardo,
soifa al vivofeliĉ'
mi kreis fabelon –
palacan kastelon
kun lago kaj ora
ŝtupar',

kun ora ĝardeno,
de kie matene
vin vekos per kantoj
birdar'.

Tra dudek montaroj
kaj multe da maroj,
sub vento kaj suno
kaj lun',

mi longe vojaĝis,
veturis kaj naĝis
kaj longe vin serĉis
ĝis nun.

Kaj jam lacigita
de l'iro, kun miro
mi subite haltis:
al mi
belega knabino

samkiel feino
kun svelta, gracia
tali'
kaj ĝoja rigardo,
brilanta kun ardo,
soifa al vivofeliĉ',
alpaŝis tremkore
kaj floro-odore
ŝi flustris: "Ĉu estas
ja vi?"

Mi kredis, ke iam
vi venos, kaj tiam
vi restos en nia
hejmland'.
Ĝi staras gastame
kaj baldaŭ akrame
akceptos vin, kara
vagant'!"

... Mi staris kaj miris,
vin ĝue admiris
kun plena, serena
anim',
ĉar vin, mia bela
feino fabela,
mi trovis en mia
proksim'.

Venelin Mitev



Malnova ĝardeno (*Régi kert*)

-- tradukis kaj sendis Adri Pásztorlaszo el Hungario

I.

Mi ŝatas legi tie en ĝardeno sub la vinberlaŭbo,
ĉar al la libro rondajn makuletojn ĵetas la suno -
ĉiuj misteraj lumrondoj sub mikroskop'mistera,
en ĝi ombroj flugas pro l' mistera danco polvera.

Ĉi tie nur simplaj floroj estas – pelargonioj,
trikoloretoj, petunioj, kaj la georginoj,
kaj rozo! – Pro mateno ĝojas eĉ gazono verda,
daliroj kaj la trifolioj ĉirkaŭflorbedaj.

Mi ne povas kanti jam per luksa metriko, rime,
nur neglekteme, kiel ĉi ĝardeno kantas polve, milde,
de kie al strato ŝajnakacia robini' rigardas
perpinte; ĉar ja ĝi, de ia etaĝa domo pli grandas.

II.

Oni povus versi longe pri la ĝardeno plurjara,
kaj pri la vintre pajlokovrita puto grincanta
pri tamarisko kies falta ŝelo kiel haŭto de oldulo
tamen prezentas mildbelajn florajn branĉojn al Eternulo!

Infane mi ŝatis mordi en foliojn kiel la ĉevalido.
Mi sciis: bonodoran aromon havas la juglando,
maldolĉan la siringo.
Ofte mi revadis pri posttagmeza ripozo sur juglandfolia
lito,
bona estus brakumi tie belmaman fraŭlinon!

Vespere se l' ĝardenon vualas la ombro de la longa
domo,

en varmegdensa aero naĝas sufoka
bonodoro.


Sekrete, langvore demandas la floreto de l'
alta arbo:
Diru: ĉu venas jam lunlumo, vi vidas foren
frato.

III.

Domo, kel', stalo, ĉirkaŭas la ĝardenon iaman,
Antaŭe staras nia dom' etaĝa, kalkadite blanka,
per verdaj fenestroj, flanke jen la najbara,
kanotegmenta, malalta.
Ofte mi eltiris kanon por sag'. Mi estis indian'
arkpafanta.

La malnova sedo staras sur la ĝardenoposta korto
sur kvar adobaj kolonoj, ene kalandril', fatras', lavforno.
De la adobo falas la kalko. Kaj tie estas la
rompfitfenestra stalo.
Iam antaŭ l' kripo staris miaavaj gaje viglaj ĉevaloj.

Makula, pajla estas l' adob'. Inter traboj
hirundoj flugas. Kelobuŝo
freŝigas, bareloj grandaj, monoj bonaj,
kadarka-vino, bongusto.
Kontraŭe al la strato granda, krada,
pordegfosto rigardas.
Antaŭdome ĉiujare l'straton la rivereto Ŝed
forlavas.



Poemo de Mihály BABITS

Babits Mihály

Radiokontaktoj sur la ŝipegoTitanik

František Frybert, radioamatoro, Brno, Ĉeĥio.

Antaŭ naŭdek du jaroj, la dekkvaran de aprilo, dum sia unua veturo la ŝipego Titanik subakviĝis. Ĝi direktiĝis el Anglujo al Usono. Sur la ŝipego estis 2200 pasaĝeroj.

Kvankam la kapitano ricevis pere de radiostacio sciigon, ke sur la vojo troviĝas grandaj glacimontoj, li ne haltigis la ŝipon, sed daŭrigis la veturon eĉ nokte, spite, ke nokte ĉiuj ŝipoj devas la veturon ĉesi.

Titanik daŭrigis sian veturon kaj ĉirkaŭ la noktomezo koliziis kun granda glacimonto. Post du horoj kaj kvardek minutoj Titanik subakviĝis. La tutan historion vi certe konas.

Kiel mi jam diris, la ŝipoj dum nokto devis stari kaj ne veturi. Kaj la radiistoj dum nokto povis dormi aŭ amuziĝi laŭ sia volo. Simile tiel estis dum tiu nokto.

Kiam okazis la kolizio, kompreneble la radiistoj de Titanik venis al la radioaparatoj, vokis kaj postulis helpon, sed neniu al ili respondis. La radiistoj sur proksimaj ŝipoj dormis. La kapitano de Titanik ordonis pafi signalajn raketojn, sed la vojaĝantoj sur la aliaj ŝipoj, kiuj rigardis la lumon, pensis, ke sur Titanik oni festas kaj do ili neglektis la signalojn.

La radiistoj sur Titanik elsendis la alarmsignalon S O S, ke la ŝipego koliziis kun granda glacimonto kaj ĝi estas grave difektita, sed eĉ post tiu malespera mesaĝo ne venis respondo.

La ŝipo Kalifornia, kiu estis plej proksime, nur 30 kilometrojn de Titanik ne reagis, ĉar la radiisto dormis. Se ili ne dormus kaj reagus, ili povis multe da pasaĝeroj savi! Bedaŭrinde! La sama situacio estis sur la ŝipoj Baltik, Olimpik, Birma, Frankfurt kaj aliaj, kiuj estis sufiĉe proksime, sed ne reagis.

Sur la ŝipo Karpatia la radiistoj povis dormi aŭ amuziĝi, sed hazarde ili ankoraŭ sidis ĉe la aparato kaj hazarde aŭskultis. Tuj ili respondis al la mesaĝo el Titanik, sed la distanco inter Titanik kaj Karpatia estis pli ol 100 kilometrojn kaj tio estis tro malproksime por sufiĉe frue proksimiĝi. Kiam la radiistoj de Karpatia ekaŭdis mesaĝon el Titanik, ili tuj respondis, ke la kapitano de Karpatia decidis turni la ŝipon al Titanik kaj rapidi helpi. Karpatia estis la unua ŝipo, kiu venis al la loko de la katastrofo.

Karpatia proksimiĝis al Titanik post unu horo kaj

duono, sed Titanik jam estis subakviĝinta. Tamen ĉirkaŭ 700 pasaĝerojn oni sukcesis savi. Nur tiujn, kiuj povis uzi la boatojn rezervitajn por helpi dum katastrofo de la ŝipo. Ve, Titanik ne havis boatojn por ĉiuj pasaĝeroj! Nur por unu triono de la personoj. Do, kiam venis Karpatia por helpi, Titanik jam estis tute sub la akvo. 1500 da pasaĝeroj dronis.

Je la sesa horo matene la kapitano de Karpatia sendis la mesaĝon: „Sur la loko ne estas eĉ unu postsigno de ŝipruino, nur grandaj glacimontoj kaj granda frosto.“

Je la oka horo la kapitano sendis la mesaĝon, ke ĉiuj pasaĝeroj, kiuj travivis la katastrofon estas sur la ferdeko de lia ŝipo kaj informis ĉiujn aliajn ŝipojn, ke ili revenu al siaj pozicioj. Poste li sendis mesaĝojn al Novjorka centro de informoj por ŝipoj.

La sekvoj de tiu ĉi katastrofo estis tiom grandaj pro tio, ĉar la kapitano de Titanik ne haltigis la veturon dum la nokto, kiel la reguloj ordonas, kaj ke la ŝipego havis malmulte da savboatoj kaj ke la radiistoj sur ĉiuj ŝipoj povis ĉesi aŭskulti dum la noktohalto de veturado.

Baldaŭ post tiu ĉi katastrofo okazis kompreneble granda aparta konferenco en Londono, kiu decidis pri novaj reguloj, inkluzive ke ŝipoj devas havi savboatojn por 100% pasaĝeroj, sur la ŝipo oni devas fari ekzercojn kiel savi sin dum katastrofo kaj sur ĉiu ŝipo devas esti tri radiistoj, kiuj sin interŝanĝas eĉ dum la nokto ĉe la aparato. Sur ĉiu ŝipo devas esti aparato, t.n. „gardilo“, kiu mem donas signalon, se okazas danĝero, precipe pri glacimontoj kaj por akcepto de mesaĝoj el aliaj ŝipoj dezirantaj helpon. Estis starigitaj ĉebordaj servoj, kiuj donas signalojn pri la moviĝo de glacimontoj.

Tiuj ĉi aranĝoj kaj instalitaj reguloj por sendanĝerigo de ŝipoj jam savis milojn da pasaĝeroj.

Fonto: Legolibreto 2 de Jindřiška Drahotova



SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI
www.CDELI.org
RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds